

1958

# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道



5

1958

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO



**IMPETO EN SOCIALISMA KONSTRUADO**

*Kolektive skulptita de junaj artistoj de  
la Cina Skulpta Laborejo en 5 tagoj.*

# Ĝenerala Linio por Nia Socialisma Konstruado

**L**A fundamentaj punktoj de la ĝenerala linio plej energie penadi kaj forte impeti al alta atingo por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui socialismon estas: mobilizi ĉiujn pozitivajn faktorojn, ĝuste trakti la kontraŭdirojn interne de la popolo; firmigi kaj disvolvi la socialismajn posedsistemojn tutpopolan kaj kolektivajn, firmigi la proletajn diktatorecon kaj internacian solidarecon; paŝon post paŝo efektiviĝi la teknikan kaj kulturalan revoluciojn dum plua plenumado de socialisma revolucio ĉe la ekonomia, politika

kaj ideologia frontoj; samtempe disvolvi industrion kaj agrikulturon sub la kondiĉo doni antaŭecon al la disvolvo de peza industrio; disvolvi samtempe ŝtatajn kaj lokajn industriojn, grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn entreprenojn sub la kondiĉo de centrigita gvidado, tuteca planado, divido kaj kunordigo de laboroj; kaj per tio, kiel eble plej rapide konstrui nian landon en grandan socialisman landon kun modernaj industrio, agrikulturo, scienco kaj kulturo.

La ĉefa tasko de la teknika revolucio estas transmeti laŭplane kaj laŭpaŝe la tutlandan ekonomion inkluzive agrikulturon kaj metiindustrion sur la bazon de nova tekniko, de la tekniko de moderna grand-skala produktado, uzi maŝinojn ĉie kie ili estas uzablaj, kaj efektiviĝi elektrigon de la urboj kaj vilaĝoj tra la tuta lando; fari industriajn ĉiujn grandajn kaj mezgrandajn urbojn, kaj establi paŝon post paŝo novajn industriajn bazojn tie, kie ekzistas la necesaj kondiĉoj, ebligi al la tutlandaj gubernioj kaj multaj 'ŝiang' kaj 'ĝen'\*, havi siajn proprajn industriojn, ke la produkta valoro de industrio superu tiun de agrikulturo en ĉiuj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj pliparte de la subprovincaj distriktoj kaj gubernioj; kovri la tutan landon per ĉiudirektaj retoj de transporto, poŝto kaj telekomuniko ĉefe per modernaj iloj; kaj samtempe kun alprenado laŭeble de la plej novaj teknikaj atingoj de la mondo, vaste disvolvi en la tutlandaj urboj kaj vilaĝoj la popolamasan kampanjon por plibonigi la laborilojn kaj renovigi la teknikojn, ke konvene interligiĝu mekanika kaj duonmekanika laboro kun necesa manlaboro.

## EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto  
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

### ENHAVO

*Bildo sur la kovrilo* — Paŝta Bubo kaj Virineto (Papertranĉaĵo laŭ la samtitola opereto)

Ili Estas Ordinaraĵ Laboruloj  
Maro de Saĝo

Plej Saĝas la Plej Plebaj

Torĉo sur la Ebenejo

Fiŝproduktado en Guangdong-provinco

Universitato de Ruĝuloj kaj Specialistoj

Mirinda Rizproduktado

Transsalto Rekte al Socialismo

Du Poemoj de Maŭ Ze-dung

Avo Sun Qun-chang

La Militantaj Regno

Kurso de Ĉina Lingvo

Impresoj el Varna-kongreso

*Bildo sur la dorsa kovrilo* — Fandado de Ŝtalo (Lignogravuraĵo de Wang Qi)



La ĉefa tasko de la kultura revolucio estas: likvidi analfabetecon, universaligi elementan edukadon, paŝon post paŝo fondi mezlernejojn en plejparto de 'ŝiang', kaj altajn lernejojn kaj instituciojn por sciencaj studoj en plejparto de la subprovincaj distriktoj kaj multaj gubernioj, kompletigi la kreadon kaj reformon de skribaj lingvoj de la minoritatoj, aktive antaŭenpuŝi la reformon de skribosistemo de Han-lingvo, ekstermi la kvar malutilajn bestojn\*\*, plibonigi la sanitarajn kondiĉojn, disvastigi sportojn kaj gimnastikon, neniigi la gravajn malsanojn, forigi superstiĉojn, ŝanĝi malbonajn morojn kaj plialtigi la nacian spiriton; disvastigi la kulturajn amuzojn de la

popolamaso, disvolvi la socialismajn literaturon kaj arton, elbaki novajn intelektulojn kaj remuldi la malnovajn, formi armeon de laborista intelektularo je multaj miloj inkluzive de teknikaj kadroj (en plej granda nombro), profesoroj, instruistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj, literaturistoj, artistoj kaj teoriistoj de marksismo.

---

\* *Ŝiang* kaj *ĝen* ambaŭ estas administra unuo sub gubernio, ili malsamas en tio, ke la loĝantaro en *ĝen* estas pli-malpli koncentra kaj iom prosperas tie industrio kaj komerco, dum en *ŝiang* troviĝas ĉefe agrikulturo kaj la loĝantaro ne tiel koncentra kiel tiu de *ĝen*.

\*\* Kvar malutilaj bestoj: pasero, rato, moskito kaj muŝo.

Yuan Mu:

# Ili Estas Ordinaraĵoj Laboruloj

**F**LAMAS la suno, blovas vento varmega kaj brulas la sablo sub la piedoj. Jen marŝas al sia laborejo en la direkto de la digo de la Dektri-maŭzolea Akvokonservejo la laborgrupo konsistanta el gvidantoj de la centraj ŝtataj institucioj kaj de la centraj organizoj de la Ĉina Kompartio kun ĉefministro Zhou En-lai en la fronto portanta brilan ruĝan flagon. Jam dum pli ol unu semajno, pli ol 500 gvidantaj kamaradoj laboris intense ĉi tie kiel ordinaraĵoj laboruloj, verŝante sian ŝviton.

Ĉiutage je la tria horo p.t.m., kiam la signal-fajfiloj eksonis, ili saltleviĝis el siaj kuŝejoj sur la tero, kiuj viciĝis unu tuj apud la alia, kaj sin viciginte marŝis al laboro. Ĉefministro, ministroj, vicministroj, departementestroj, teknikistoj, sanitaristoj aŭ administrantaj funkciuloj, ĉiuj piediras pli ol kvar kilometrojn al la konstruejo gaje babilante. Ili laboris ĝis 11-a horo nokte, kaj nur tiam revenis al la loĝejo lasante post si la digon kie miloj da elektro-lampoj brilis. Ofte kiam tiu taĉmento renkontis survoje alian el junaj konservejo-konstruantoj, la spritaj junuloj laŭte ilin provokis: "Huangzhong-taĉmento\*, bonvole kantu!" Ankaŭ la "maljunuloj" ne volis montri

sin sentaŭgaj rivaloj kaj prenis al si la iniciativon kiam ili vidis junulojn malproksime marŝantaj: "Junuloj, bonvole kantu!" Kaj tiam inter ardaĵoj vokoj kaj ridoj ĝojaj kantoj ekŝvebas en la varma vento.

## Ĉi-tie Ne Estas Estraj Moŝtoj

Je la unua tago, la politika komisaro de la Ŝhaxi-sekcio de la Ĝenerala Komandejo de la Akvokonservejo, kamarado Bai Shoukang venis ĉi tien por asigni labortaskon. Lia unua frazo "Bonvenon, viaj estraj moŝtoj. . ." estis tuj korektita de kamarado Zhou En-lai kiu diris: "Tie ĉi ne estas estraj moŝtoj, ne estas ĉefministro, ministroj, vicministroj, nek departementestroj, ni ĉiuj estas ordinaraĵoj laboruloj." Kaj kamarado Wang Zhen aldone diris al kamarado Bai Shou-kang: "Nun vi estas nia estro, kaj ni ĉiuj estas viaj subuloj."

La varmega sunbrilo faris la ŝtonojn brulaj, sed la laborantoj ignoris tion, ĝoje nomis la pli-grandajn ŝtonojn akvomelonoj kaj la malgrandajn mosk-melonoj. Ili transportis rapide la ŝtonojn al la stacio, kie ŝtonoj estis envagonigataj, kriante: "Jen granda akvomelono!" "Jen malgranda



akvomelono!" Kelkdekoj da unuradaj puŝaroj plene ŝarĝitaj per ŝtonoj rapidas en la laborejo. La laborantoj vektportis korbojn de ŝtonoj kaj rapide iris kvazaŭ flugante. Preskaŭ ĉiu membro el tiu labortacmento kun meznombra aĝo de pli ol 45 jaroj volis konkuri kun la aliaj je fervoro en la laborado. Antaŭ la komenco de la kolektiva laborado, kamarado Zhou En-lai ekzercis sin je uzado de unurada puŝaro. La dekstra brako de nia estimata ĉef-ministro iam rompiĝis pro falo de ĉevalo en revolucia milito, kaj ĝis nun tiu ĉi brak ankoraŭ ne estas rektigebla. Malgraŭ la admonoj de la kunlaborantoj, li insistis puŝi kelkfoje ŝtonŝarĝitan ĉaron por lerni tiun laborspecon post siaj enĉarigo de ŝtonoj kaj tirado de ĉaroj. La ministro de Publika Ordo kamarado Luo Rui-qing ripete konsilis la aliajn zorgi pri laborsekureco kaj labori laŭ sia forto, sed alveninte al la laborejo li mem tuj forgesis sian konsilon kaj laboris pli kaj pli energie. Kamarado Gong Zi-rong, sekretario de la Partia Komitato de la centraj ŝtataj institucioj estis ĉi tie politika komisaro de subtaĉmento. Li kaj kamarado Lian Guan estas paro de "malaltaj dikuloj" fame konataj en la laborejo, tamen ili persistis en la portado de korbegoj ŝtonŝarĝitaj kaj gajnis al si laŭdon de la kunlaborantoj per sia persisteco. Kamarado Li Bao-hua vundis sian fingron en ŝtonportado kaj sango elfluis el la vundo. Sed li insistis, ke negrave vundita li ne devas retiri sin de la fronto kaj tial li daŭre laboris des pli entuziasme, post kiam la fingro estis bandaĝita.

## Neforgeseblaj Personoj

Jen estas kelkaj personoj ĉe la laborejo, kiujn oni neniam forgesos: kamarado Wang Xing-rang, kiu perdis unu brakon en sia juneco, jen ŝarĝadas kaj malŝarĝadas ĉarojn senĉese per ŝtonŝarĝitaj korbegoj kelkdek kilogramojn pezaj kune kun aliaj; jen li vektportas ŝtonŝarĝitajn korbegojn, rapide kaj lerte; jen li helpas aliajn tirante ĉaron rekte antaŭen. Ŝvito malsekigis lian veston, tamen laborante li babiladis laŭte kaj gaje kun la kunlaborantoj aŭ mallaŭte kantis. Kiom da ĝojo la ordinara laboro alportis al tiu ne lacigebla homo. Sur la laborejo li estis respekte nomita "Heroo Solbraka". Kamarado Zhang Yi-bo estis vundita en la Norden-milito je ambaŭ genuoj de soldatoj sub la militaristo Sun Chuan-fang en la jaro 1926 en la provinco Jiangxi, kaj poste estis arestita de Kuomintang-aj reaktuloj en la jaro 1931, kiam li laboris subtere por la Partio en la malfacilega cirkonstanco de blanka teroro, kaj suferis longdaŭre en karceroj de la malamikoj. Rezulte de tio, liaj gamboj nun ne povas fleksiĝi. Kamarado Zhang Yi-bo ne nur decidis partopreni en tiu ĉi laboro malgraŭ malkonsiloj de amikoj sed eĉ insistis



Ĉefministro Zhou En-lai (dekstre la unua) ĉion lernas

Foto de Liu Dong-ao

piediri al la laborejo kun la helpo de lambastono kaj laboris same entuziasme kiel la aliaj. Kamarado Jin Ming suferis de pleŭrito dum la infaneco kaj ne ricevis bonan kuracadon. Lia sano estis plue difektita rezulte de la longtempa malfacila revolucia vivo, unu pulmo ŝrumpis kaj nun la maldekstra brusto videble enfalis. Sed li estis unu el la tenantoj de la plej alta rekordo en ĉar-puŝado. Multaj el la plijunaj departementestroj ripete diris al mi: "Antaŭ tiaj herooj, estas nenio se ni faras iom pli multe da laboro."

## Ju Pli Maljunaj Des Pli Bravaj

Multaj maljunuloj montris sin herooj "ju pli maljunaj des pli bravaj", kaj aperis junaj en la kolektiva laboro kaj vivo. La 72-jara vicministro Chen Qi-yuan estis la plej maljuna en la taĉmento. Li ne nur laboris kun fervoro sed plibonigis sian apetiton post du tagoj, ke preskaŭ duobligis lia manĝkvanto. La ĉ. 60-jara ministrino Shi Liang "povis kaj brakpreni akvo-melonojn kaj kolekti sezamojn", t.e. porti grandajn kaj malgrandajn ŝtonojn. Vicministroj Pan Zhen-ya kaj Zhuang Quan estas samaĝuloj, ambaŭ pli ol 70-jaraj, mi ofte trovis ilin naive koleriĝantaj pro tio ke la kunlaborantoj de tempo al tempo "intervenis" por konsili ilin iom ripozi. Vicministroj Ye Sheng-tao kaj Zheng Zhen-duo ambaŭ ĉirkaŭ 60-jaraj, montriĝis persistemaj en fervora laboro. Ministro Li De-quan estis konata kiel "maljuna je jaroj sed juna korpe kaj spirite". La unuan tagon kiam ŝi alvenis al laborejo, ŝi laŭte atentigis aliajn pri sano kaj ripete "ordonis" ke oni ne laboru tro furioze, sed ŝi mem laboris nelacigeble. Kamarado Meng Xian-min el la Ministrejo de Geologia Esplorado, aŭdinte ke oni preparolis lin kiel maljunulon, ofendiĝis kaj diris: "Kio, ĉu vi opinias, ke mi havas tro grandan barbon?" La



Post streĉa laborado

Foto de Liu Dong-ao

sekvantan tagon li forrazis sian barbon kaj fariĝis pli energia.

## Elĉerpi "Nutraĵon" el Laboro

Kvankam la gvidantaj kamaradoj estis tre okupataj kaj ne povis dediĉi pli multe da tempo al la kolektiva korpa laboro, tamen ili, en la mallonga periodo de unu semajno, tre atente kaj serioze zorgis pri ĉiu detalo en la labor-procedo elĉerpante nutraĵojn por riĉigi la gvid-penson kaj plibonigi la gvid-stilon. En la unuaj du tagoj, ili formis sin en tri vicojn por transporti ŝtonojn de mano al mano. Poste, la distanco de transporto plilongigis, kaj plie pro tio, ke la fizik-fortoj de la laborantoj ne estas egalaj, la efikeco de tiu transporto estis ne tre kontentiga. En la tria tago, la rekordo de ŝton-transporto malpliigis de 130 kubmetroj ĝis 90 kubmetroj. Tial multaj el ili tuj proponis, ke veturiloj estu uzataj. Oni provis tiun metodon unue en du taĉmentoj kaj post kiam la sukceso fariĝis videbla, tiu metodo estis disvastigita en la tuta laborkampo. Kelkaj el la laborantoj publikigis opini-afiŝojn montrante ke "la du malsamaj metodoj donis du malsamajn rezultojn", kaj ke "ili ekkonis per sia labor-sperto, ke en la gvidado de produktado estas necese ĉiutempe zorgi pri la rearanĝo de labor-organizado kaj pri la disvastigo de teknika novigo en la venonteco."

## Tie Ĉi Estas Universitato de Laboro

Dum vespermanĝo, la laborantoj ĝuis en la laborejo la pretigitan manĝaĵon kun ajlo kaj kelkaj pecoj da salajo. Tiam estis ankaŭ la tempo por kamarado Rong Gao-tang, la "prezidanto de la Klubo" fariĝis plej aktiva. Maĉante bongustan maiz-panon, oni povis aŭskulti lian deklamon de poemoj, lian Pekin-stilan tamburkantadon kaj popolkanton en la stilo de norda Shānxi. Ministrino Shi Liang ankaŭ iufoje amuzis pli ol 300 aŭskultan-

tojn per sia imitado de kokeriko, miaŭado kaj bojado. Eĉ por kelkaj el ŝiaj malnovaj konatoj estis la unua fojo aŭdi sian interesan imitadon. Kamarado Wang Zhen, kiu gvidis dum la kontraŭjapana milito la Grandan Produktomovadon en Nanniwan en norda Shānxi, ne nur sin montris eĉ nun sperta laborulo, sed ankaŭ kaŭzis al la aŭskutantoj ridegon per sia anekdoto pri dogmisma eraro de Konfucio.

Ĉiumatene, dum la ripoza tempo, la laborantoj aŭ kunvenis aŭ lavis sian ŝvitotrempitajn vestojn. Kelkaj estis kaptitaj de poeziemo kaj publikigis opini-afiŝojn en la stilo de popolkanto, moderna versaĵo aŭ klasika versaĵo por esprimi sian novan komprenon kaj ŝanĝon sentimentan en la kolektiva laborado. Kamarado Lian Guan verkis en unu spiro poemon el 104 versoj. En tia intima kaj amikeca atmosfero, multaj el la maljunuloj fariĝis pli junaj.

"Manĝi kune, loĝi kune kaj labori kune" — tio ne nur ŝanĝis profunde la rilaton inter homoj, sed ankaŭ profunde aliigis la penson de multaj. Iuj diris, ke ili akiris duoblan rikolton de laboro kaj penso, kaj aliaj aldonis, ke "laboro kuracis ĉian malsanon". Kaj fakte ĉiuj plibonigis sian sanstaton, tial estas preferinde diri ke ili akiris "trioblan rikolton de laboro, penso kaj sano". Ĉiuj diris, ke ili ricevis en la "Universitato de Dektrimaŭzoleo" edukon de laboro kaj sentis sin honora, tial disigante ili nomis unuj la aliajn kunlernantoj.

\* Huang Zhong, antikva maljuna heroo de la periodo de Tri Regno (220—265 p. K.)

(Daŭrigo de P. 165)

## Ho Suno, Ho Suno, Respondu al Mi

Ho suno, ho suno, respondu al mi,  
ĉu vi ja kuraĝus konkuri kun ni?  
Jam longe laboris ni sur la kamparo,  
ankoraŭ vi kuŝas en lito sen faro;  
kaj antaŭ ol ni hejmen iras substele,  
vi ĉesis deĵori jam longe subtere.  
Ho suno, ho suno, respondu al mi,  
ĉu vi ja kuraĝus konkuri kun ni?

## Terportas Fluge la Karulo

Terportas fluge la karulo,  
tuj sekvas lin mi en konkuro.  
Eĉ se en nubojn li sin svingos,  
ankoraŭ mi lin kuratingos!

# Maro de Saĝo

— Pri la Landa Ekspozicio de Agrikulturiloj —

**L**A placo de la Pekina Instituto de Agrikultura Mekanikigo pleniĝas de miloj da novtipaj agrikulturaj instrumentoj. Aŭdinte la klarigojn de la ekspoziciaj laborantoj pri la reformitaj agrikulturiloj, vi tuj ekvidas, ke en ĉiu el ili brilas saĝo de la laboranta popolo.

En tiu ĉi ekspozicio ne troviĝas multaj grafikoj, diagramoj, sloganoj kaj diverskoloraj ornamaĵoj, kiuj ĝenerale abundas en ekspozicioj. Sed sur ĉiu ekspoziciaĵo skribiĝas kiom da obloj plialtiĝis la laborefiko dank' al ĝia aplikado. La instrumentoj estas faritaj el fero, ligno aŭ bambuo, kaj diversaj estas iliaj formoj. Kelkaj el ili kreiĝis antaŭ nelonge, sed jam multe kontribuis al la impeta disvolviĝo de agrikulturo.

Ĉi tie ekspoziciigis centoj da diversspecaj radĉerpiloj\*. La radĉerpilo reformita el sensemiga koton-maŝino fare de Zhang De-he en Jiangxi-provinco estas facile turnebla kaj ĉiutage povas irigacii 30 muojn da tero. La oportuna strukturo de la radĉerpilo transformita el biciklo fare de kamparano en Jiang-gubernio, Hebei-provinco, ebligas legadon dum oni ĝin funkciigas. La akvopumpilo preskaŭ tute ligna, kreita de agrikultura kooperativano en Jinghai-gubernio, Hebei-provinco, bone funkcias kiel tiu el ŝtalo fabrikita, tamen ĝia produktokosto estas nur dekono de la ŝtala. La malnovtipa radĉerpilo kaj eĉ la novtipa kreita tuj post la liberigo estas reformitaj de la kamparanoj. Oni aldonis inerciradon al la malnova radĉerpilo kaj ĝi fariĝis facile turnebla, pliefika, kaj oni povas ĝin turni pedale sidante. Iuj eĉ aldonis al ĝi ventumilon, kiu ventumadas dum la funkciado de la radĉerpilo, ke la laboranto ne suferu de varmego. Tiaj reformitaj akvoĉerpiloj, pli malpezaj tamen pli efikaj, aperis en diversaj provincoj de Ĉinio.

Samtempe, ĝis la unua duono de 1958, ankaŭ la laboristoj kreis multajn akvoĉerpilojn por la kamparanoj. Ĉe la nove farita baseno de la ekspoziciejo diversaj vapormaŝinoj kaj gasmotoroj turnas akvopumpilojn starantajn apud la radĉerpiloj faritaj de la kamparanoj. Bruegas la motoroj, kaj dikaj kaj maldikaj akvokolonoj ŝprucas en la basenon. Inter ili, la pumpilo por irigaciado en montregiono farita de ferajfabriko en Changsha, Hunan-provinco, povas ŝpruci akvon ĉ. 200 metrojn alten.

La ekspoziciitaj instrumentoj por akvokonserva konstruado estas same multaspecaj kiel la akvoĉerpilo. En la provincoj Hubei, Henan, Anhui kaj en la Nordoriento kaj Sudokcidento, diversaj lignaj reloj kun fera aŭ bambuaj surtegajoj estas kreitaj por transportaj vagonoj flugrapide kuradas sur la lignaj reloj.


Ter-transportado en akvokonserva konstruado estas peza laboro, kaj ĝuste pro tio kreiĝis multegaj instrumentoj. Krom ligna relvojo, kreiĝis kablo-relaj transportiloj, diversaj pulioj, transportaj rubandegoj kaj troĝenoj. Dum la lastaj vintro kaj printempo, la provincoj Henan kaj Anhui fosis plej multe da ter-kuboj en akvokonserva konstruado, kaj ili ankaŭ kreis plej multe da laboriloj. En la ekspoziciejo oni povas vidi diversajn transportajn troĝenojn cirkulantajn en la aero. El tiuj transportiloj, iuj povas aŭtomate elverŝi sian ŝarĝon kaj kelkaj eĉ povas mem sin ŝarĝi.

Mekanikigo de transportiloj markas la komencon de nova epoko de kampara transportado. La ĉinaj kamparanoj estas liberiĝantaj de la miljara peniga portado surŝultra kaj surdorsa. Tiun ŝanĝiĝon oni povas bone rimarki en la ekspozicio. Diversaj ĉaroj kaj boatoj faritaj de la kamparanoj mem kaj multaj motorhavaj transportiloj nome triradaj aŭtoj, motor-ŝipoj k.t.p. faritaj de la laboristoj, estas tre taŭgaj por transportado en la kamparo.

Por impetado en disvolvo de agrikultura produkto, la diverslokaj kamparanoj plibonigis kaj kreis multajn agrikulturilojn. La dusoka plugilo kun du radoj, kiun oni komencis disvastigi en la

**Pedalante radĉerpilon oni povas ankaŭ legi**

*Foto de Meng Qing-biao*





**E**N 1955, la laboristoj kaj oficistoj de Andong-a Maŝina Fabriko ĉagreniĝis pro la "malsato" la fabriko. Sed novan direktoron—servi al la agrikultura produktado, vizaĝe al la kamparo, montris al la fabriko, la bolanta kooperativigo de agrikulturistoj tra la tuta lando post la publiko de la raporto de prezidanto Maŭ "Pri la problemo de agrikultura kooperativigo". Konforme al la nova situacio la fabriko komencis produkti multajn agrikulturajn instrumentojn por plugado, irigacio kaj transportado, kiujn la kamparanoj urĝe bezonis. Kaj pli poste la laboristoj en la fabriko ekpensis, "Ĉu ne eblas anstataŭi bovojn per maŝinoj en plugado?"


Oni ekpensis nature pri la traktoro, tiel ĉe la estraro kiel ĉe la laboristoj. Sed ili tuj konsciis, kiel tia mizera fabriko povus produkti traktorojn. Antaŭe, ĝi estis ja nur malgranda riparfako de iu gasuzino. Trovinte en malgranda strateto ĉirkaŭ dek ĉambrojn, oni instalis tie malnovajn kadukajn maŝinojn kaj faris akcesorajn riparojn. Ĝis 1955 kvankam jam multe disvolviĝis la laboroj kaj dekobliĝis la laborantaro, tamen la ekipaĵoj restis mizere modestaj: laborejoj el matoj kaj tabuloj, kelkaj eĉ sub la libera ĉielo, tri dek kadukaj maŝinoj por 300 laboristoj, troviĝis neniu inĝeniero,

kamparo nur antaŭ du jaroj, fariĝis pli malpeza kaj bonfunkcia post diversmaniera reformo, ĝi eĉ povas esti uzata por semado, sterkado kaj sarkado. Kamparanoj en la provincoj Henan kaj Sichuan eĉ kreis plugilojn kun du sokoĵoj por plugi profunde aŭ plugante renversi teron ambaŭ-flanken.

La laboristoj kaj metilaborantoj diverslokaj kreadas ankaŭ novajn terkulturajn instrumentojn por la kamparanoj. Krom maŝinoj por frakasi terbulojn, rikolti arakisojn, kreiĝis ankaŭ boateto por

#### Modelo de hidroelektrejo sur ebenejo

Foto de Meng Qing-biao



# Plej Saĝas

eĉ ne oficiala teknikisto. Kiel kuraĝus tia mizera fabriketo pensi pri produktado de traktoroj!

Ĉu ekprovu aŭ lasu, jen la demando.

Sed emociataj kaj kuraĝigataj de la tutlanda agrikultura kooperativigo, de la perspektivo de mekanizado de agrikulturo, ili fine aŭdace decidis ekprovi la aferon.

#### Provado kaj Klopodado

Speciala grupo estis komisiita por provfabriki la novan produktaĵon.

Estas tiaj homoj nun en nia lando kiuj proprakule neniam vidis traktorojn, krom en filmo, sed pretas ĝin elfari per siaj du manoj kaj kapo. Tiaj estis ĝuste la membroj de tiu speciala grupo. Ili estas:

Zhang Lian-cheng, vicedestro de la fabriko, infan-laboristo ekde la aĝo de 12 jaroj. Li ne vizitis lernejon eĉ unu tagon, sed 38-jara laborado elforĝis al li du tre lertajn manojn. Kun revolucia temperamento de malnova laboristo li en daŭro

plantado de riz-plantidoj kaj aliaj novaj aparatoj kaj maŝinoj. Plej ĝojige estas, ke en la plejmulto de niaj provincoj traktoroj estas prove produktataj. Jam kreiĝis ĝis la unua duono de 1958 pli ol cent specoj de traktoroj, el kiuj iuj ankaŭ taŭgas por rizkampoj. Jiangxi-provinco ne nur sukcese elfabrikis bonkvalitan traktoron, sed ankaŭ specialajn terkulturilojn por rizkampoj

La ekspoziciaĵoj pri la hidroelektrejo konstruita sur ebenejo en Hebei-provinco, la irigacia fajenco-tubaro subtera kreita de kamparanoj en Yanshi-gubernio, Henan-provinco, la metan-produktaĵ basenoj vaste starigitaj en Hubei-provinco, la sunenergiaj boligiloj de Ŝanhajo kaj Gansu-provinco, cemento, niveliloj k.t.p. kreitaj de diverslokaj kamparanoj kune formis brilan vidaĵon kuraĝigan. Ĉio en la ekspozicio montras al la vizitantoj, ke ĉinaj kamparanoj estas farantaj tion, kion la antaŭuloj eĉ ne kuraĝis imagi, ke tio estas nur la komenco de teknika revolucio en agrikulturo.

\* Akvoĉerpilo kun unu aŭ pluraj radoj sur kiuj cirkulas ĉeno da trogaro aŭ klaparo, kiuj povas ĉerpi akvon supren el puto k.a.

# la Plej Plebaj

de kvar jaroj starigis kvar fabrikojn preskaŭ el nenio, dank' al diligento kaj ŝparemo. La laboristoj nomis lin kapabla "fondisto". Laŭ sia propra vorto, li estas "homo, kiu kuraĝas supreniri la ĉielon, se oni nur subtenas la ŝtupetaron."

Chang Feng-yao, laboristo dum pli ol 30 jaroj, kiu vizitis lernejon nur 4 jarojn, rangas kiel laboristo de 8-a klaso, majstras la laboron super ŝraŭb-tenilo, kaj estas konata kiel "specialisto" por ripari kadukiĝintajn maŝinojn. Ne malofte li revivigis tiajn maŝinojn, kies rebonigadon ordinaraj riparistoj ne kuraĝas entrepreni. Kiam montriĝas malfacilaĵoj en laboro, la laboristoj ĉiam petas konsilon de la "ĉionscia kapo" kaj oni prave diras: "En la ĉeesto de majstro Chang ni sentas ĉiam solidan grundon sub niaj piedoj por ĉiuj laboroj."

Chen Tai-nian, 26-jara junulo enprofundiĝema al ĉio nova, malcedema al tio, kion aliaj opinias ne ebla. Li ofte provas laborojn teknike tro komplikajn kaj ne venkeblajn por li, kiel laboristo de tria klaso. Lia laborfervoro kaj enprofundiĝemo renkontas la laŭdojn de la labormajstroj, kiuj trovas en li energian helpanton. Li eniris en la grupon nur pro sia persista kaj plurfoja petego, ĉar plaĉis al li la kreivopostula tasko.

Estis ankoraŭ aliaj 5 laboristoj. El ili la plej feliĉa lernis nur 6 jarojn en la lernejo, kaj iuj eĉ tute ne. En la malnova socio ili estis tretataj sub la piedoj de la "noblaj" humiligate, turmentate kaj malesperigate. Sed nun kiam ili fariĝis mem mastroj de la fabriko, ili estas saturitaj de belaj aspiroj por konstrui socialismon kaj montras sin ne-ŝanceleble firmaj kaj sentime kuraĝaj en laborado. Ili pretis per siaj nuraj manoj kaj senfina saĝeco fari miraklojn.

Kiam ili komencis la entreprenon ili havis nek praktikajn spertojn nek teknikajn materialojn koncernajn. Nu, de kie komencu? La demando kaprompis tagnokte al Zhang Lian-cheng, kiu estris la specialan grupon. Iutage oni en la rubejo de feraĵoj trovis malnovan difektitan dizelon solcilindran. "Ĉu ne estus bone, ke ni unue fiksi al la dizelo kvar radojn por ke ĝi kuru, kaj poste faru ĝin kapabla por treni plugilon?" proponis iu maljuna laboristo. Sed neniu sciis kiom granda estos ĝia trenkapablo. Longe oni diskutis kaj fine decidis ke ĉian pordeton oni ne preterlasu, ĉian eblan rimedon oni pripensu kaj tuj ekprovu, kaj laŭ la rezulto plibonigu, kaj tiel oni tiru paŝo post paŝo konkludojn el la praktikado. Do komenciĝis

la provado. La rubejo fariĝis nun por ili trezorejo. Post kelk-taga streĉa riparado kaj aliformigo elfariĝis trenmaŝino: Ili instalis la maŝinon sur malnova ĉarframo, aldonis al ĝi dentradojn kaj aksojn kaj alfiksis kvar aŭtomobilajn pneŭmatikajn radojn kaj direktilon. Jen, post ekfunkciigo ĝi sin movas antaŭen.


Unua sukceso atingita, la dua tuj sturmata. La rezulto pruvis, ke ilia fabriko povas treni plugilon. Tiam ili ekhavis plenan memfidon, ke ili kapablas fabriki traktoron.

Por, konforme al la teknikaj kaj ekipaj kondiĉoj de la fabriko, provprodukti traktoron, simplan en strukturo kaj malkaran en kosto, ili ĉie serĉis detalan desegnon de traktoro kaj koncernajn teknikajn materialojn. En iu ilustrita gazeto ili trovis bildon de traktoro konforma al iliaj deziroj, kiu estas Hungaria produkto kaj posedata de iu agrikulturejo en Shandong-provinco. Zhang Lian-cheng tuj sendis desegniston por fari detalan desegnon laŭ ĝi. Sed tio ne estis ebla, ĉar tie multege da laboroj atendis la maŝinon. Tamen ili sukcesis trovi ke maŝinion de la sama tipo posedas ankaŭ la Traktora Stacio de Beizhen-gubernio, Liaoning-provinco. Zhang Lian-cheng rapidis tien kun du maljunaj laboristoj kaj unu teknikisto-metilernanto. La stacio informiĝinte pri ilia celo tre ĝojis kaj helpeme aranĝis la aferon, ke unu traktoro estas destinita je ila dispono. Kaj ili starigis tendon sur kampo kiel loĝejon, formis tablon el tabulo metata sur korboj kaj uzis lignajn blokojn kiel seĝojn. Tiel ili ekdiligentis super la traktoro. Post streĉa laboro de tri monatoj, ili fine havis desegnojn de ĉiuj detaloj de la traktoro.

## Miraklo per Propraj Rimedoj

Por fabriki traktoron, ordinare oni bezonas multajn instalaĵojn, maŝinojn kaj instrumentojn, inkluzive elektran fornon kaj sciencajn aparatojn. Sed tio kion havis la fabriko estas nur du torniloj, unu polur-maŝino kaj unu rabotmaŝino, ĉiuj de malmoderna tipo. Kiam ili funkciigis, ili faris teruran skuadon. Tamen la grupo komencis la laboron.

La rapidŝanĝa dentradaro estas grava parto de traktoro. Ĝi devas esti malmola por rezisti frotadon kaj ne facile rompebla. Tian ŝtalon oni faras per termika procedo en elektra forno. Sed ili ne sciis eĉ la konsiston de la ŝtalo uzata. Zhang Lian-cheng elprenis el la rubejo malnovan



senutilan dentradon de aŭtomobilo, li ĝin explore dispartigis kaj imitante elfaris rapidŝanĝan dentradaron. Anstataŭ elektran fornon ili uzis krisolon. Tiel ili fine sukcesis fabriki la bezonatan dentradaron.

Dum la provado, iuj dubis kaj hezitis: ĉu la tuta klopodo vere alportos rezulton? Ĉu ĉio farita estas teorie pravigebla? Sed plenfide respondis Zhang Lian-cheng: "Mi ne kredas, ke ni ne povas fari kion aliaj landoj jam sukcesis. Se ni ne trovas pravigon en la libroj, nia sukceso servos por pravigi nian faron." Tiom pli ĉe la multjaraj laboristoj, oni malfacile aŭdis ion, kiaj "ne povas", "ne eblas". Ili ĉiam diradis: "tio eblas", "ni povas", "ni provu" k.s. Ili uzis surogatojn por anstataŭi enportitajn materialojn, mem faris ilojn ne aĉetebajn kaj mane faris ĉion en okazo, kiam mankis necesaj maŝinoj. Ili uzis la spertajn okulojn kaj orelojn por ekzameni anstataŭ sciencaj instrumentoj. Unuvorte, ili faris ĉion kion ili kapablas.

**Wang Yu-shi:**

## Torĉo sur la Ebenejo

**E**LIRINTE la vagonaron ĉe Chenguantun-stacio, Jinghai-gubernio, Hebei-provinco, mi ekiris al Chenguantun laŭ la larĝa digo ĵus konstruita. La subiranta suno jam kliniĝis al la horizonto, kaj varma vento somera alblovadis la akvoodoron de la Granda Kanalo miksitajn kun la aromo de tritikaj plantoj.

Antaŭ mi sur la digo staris malgranda terkabano, apud kiu staris vico da ne tre altaj elektrofadenaj stangoj, sin etendanta ĝis la vilaĝo, al kiu mi iris. Kiam mi alproksimiĝis al la kabano, mi ekaŭdis bruon similan al tiu de motoro en fabriko. "Ho," mi ekkriis, "tio certe estas la hidroelektrejo de Chenguantun!"

Pli ol kvardek vizitantoj el tiu ĉi kaj aliaj provincoj estis pririgardantaj la hidroelektrejon, kaj Zhang Mao, la vilaĝestro kaj Li Shi-zhen, membrino de la Komunisma Junula Ligo, zorganta de la konektotabulo, estis klarigantaj al la vizitantoj. Aŭskultante al ilia klarigado, mi pririgardadis la elektrejon. Kiel strange! anstataŭ torenta akvofalo kiu devas troviĝi ĉe hidroelektrejo laŭ mia imago, ĉi tie kviete fluas nur nove fosita defluejo de la Granda Kanalo. Anstataŭ ferbetona digo kaj ŝtala barilo, ĉi tie mi trovis nur konstruaĵon el malnovaj tabuloj, bambustangoj, matoj, fragmitoj kaj koto!

La malfacilaĵoj faris ilin pli saĝaj kaj pli kapablaj. Ju pli granda estis la malfacilaĵo, des pli surpriza la solvrimedo.

Kiam ĉiuj partoj estis fine elfaritaj kaj kunmuntitaj en feb. 1957, aperis antaŭ ili komplete traktoro. Sed ĝi ne bone funkciis. Ĉiuj grupanoj dum tri tagoj ĉagrenite esploris kaj interkonsiliĝis ĉirkaŭ la maŝino. Forestis al ili en tiuj tagoj apetito kaj dormemo. Estis jarfino laŭ malnova (luna) kalendaro, sed ili ankoraŭ laboris ĉe la traktoro ĝis la vespero. La estro kaj la partia sekretario de la fabriko devis mem ilin "peli" hejmen. Sed baldaŭ ili ĉiuj denove revenis al la traktoro kvazaŭ laŭ interkonsento. Ili laboregis ĝis la traktoro bone funkciis en sekvinta tago t. e. la novjara.

Kaj tiel naskiĝis la traktoro "Yalu-rivero n-ro 1", el la manoj de tiuj "plebanoj" el malnova socio kaj mastroj de la lando sub la nuna reĝimo.

Kaj la akvo-turbino estas tute farita el ligno escepte de la feraj akso kaj kovrilo ankaŭ la ekstra generatorejo estas kabano el bambustangoj, sorgo-tigoj kaj fragmitoj. . .

Ĉio ĉi tio estas rekta malo al la imagata de mi impona kaj bone ekipita hidroelektrejo. Ne nur mi, sed ankaŭ multaj vizitantoj elektro-inĝenieroj laŭdadis la elektrejon, kian ili ne povis imagi al si eĉ en sonĝo, kaj al multaj kadroj ĝin vizitantoj la mistero de hidroelektrejo estas forigita. Multaj kamparanoj laŭte ridadis ĉe la nova konstruaĵo: "Ho, jen tia estas elektrejo! Ek al la laboro! hejmen iru kaj mem konstruu elektrejon!"

Senfina estas la aspiro de la popolo al pli bela vivo, kaj post plena venko en akvomastromado, la loĝantoj en Tianjin-a Subprovinca Distrikto ekstrebis al elektrigo. Sed la vorto "elektro" sonas kiel mistere al la tieaj kamparanoj, kaj elektrigo—kiel bela sed fora afero! Kelkfoje oni parolis pri elektro nur por ŝerco. "Antaŭe, kiam mi muelis tritikon," diris iu maljunulino Li, "Mi ŝercis kun la infanoj: 'Atendu, jam venos la tago, kiam vi muelos per elektro!' kaj ĉiuj ekridis. Kiu ja atendis, ke tiel rapide efektiviĝos la revo!"

Pumpi akvon, produkti farunon, funkciigi ferfandejon, elektrajn lampojn, radiaparatojn. . . per elektro — jen estas ĉies aspiro. Ĉu estas eble fondi hidroelektrejon en la kamparo, precipe en




kamparo sur la granda ebenejo? “Ne ekzistas necesaj kondiĉoj sur la ebenejo de Hebei-provinco por konstrui hidroelektrejon,” asertis iuj elektro-inĝenieroj. Estas skribite en la scienca literaturo, ke estas neeble konstrui hidroelektrejon tie, kie la niveldiferenco de akvo estas malpli ol 1.5 metroj. Sed la aŭtoritata literaturo scienca ne malkuraĝigis la popolamason.

En februaro de la kuranta jaro, aŭdinte, ke oni konstruis hidroelektrejon en Wulizhuang-vilaĝo, k-do Zhang Mao tuj interkonsiliĝis kun ĉarpentistoj pri fabrikado de modelo de akvoturbino. Ne havante sciencajn kaj teknikajn sciojn, nek vidinte hidroelektrejon, ili tamen fine kreis ian strangan modelon. Estas mirinde ke la maŝineto ekfunkciis metite kontraŭ akvo-fluo. Ili sopiradis, studadis kaj la popolamaso ilin urĝadis: “Ĉu ni povas konstrui hidroelektrejon?”

Ĝuste tiam, en la lasta semajno de marto, la loka partia komitato decidis fondi kurson en la vilaĝo por instrui en praktiko hidroelektreajn konstruantojn kaj konstrui hidroelektrejon tie en kvin tagoj, kaj alvokis ke oni kontribuu lignon. Estis malfacile akiri ŝtonon kaj lignon sur la ebenejo. Sed oni alportis pordofoliojn kaj malnovajn benkojn, kaj la senidaj geedzoj Leng, kiuj jam havas pli ol sesdek jarojn kaj vivas helpe de la kooperativo, nun alsendis al la konstruejo la ĉerko-tabulegojn, kiujn ili pretigis por si antaŭlonge. La vilaĝaj kadroj ĉiel rifuzis, sed la maljunulo persistis ofendite: “Vi nepre devas akcepti. Ni jam atendadis la tutan vivon por vidi la hodiaŭan feliĉon, la kontribuo prezentas mian volon.” Por havigi al si solidan lignon por la akvo-turbino, la amaso proponis haki la maljunan soforon\*, kiu jam aĝis ĉirkaŭ jarcenton. Antaŭe, la amaso kultadis al ĝi kaj eĉ ne kuraĝis vundi ĝian ŝelon, sed nun ili forlasis la superstiĉon kaj servigis ĝin al la afero de elektrigo.

Komenciĝis la konstruado, kaj torentis al la konstruejo junaj kamparanoj kaj kamparaninoj, instruistoj, gelernantoj kaj aliaj laboruloj. En la kanaletoj ankoraŭ troviĝis glacitavolo, sed ne grave! Junulino Yu Jun-fen, membro de la Komunisma Junula Ligo ekvadis en la glaciakvo, kaj ŝin sekvis centoj da homoj al la batalo. Tage kaj nokte tie daŭradis streĉa laborado, kaj oni sukcesis altigi la niveldiferencon de akvo ĝis 1.2 metroj, kaj diris ridante: “Ni vidu, ĉu estas neeble generi elektron ĉe akvofalo malpli ol 1.5-metra.” Samtempe ili sendis mezlernejan diplomitino Li Shi-zhen al la guberniurbo por lerni elektran teknikon.

Memfido kaj energio venkas ĉion. La hidroelektrejo finkonstruiĝis en kvin tagoj. La generatoron oni faris el malnova dinamo. La tuta loĝantaro ĝojkriadis kaj kuradis ekzalte, kiam ekbrilis unufoje la lampoj de la hidroelektrejo. Tiu



**Huangguoshu-akvofalo**

*Lignogravuraĵo de Jia Yi-xiang*

vespero estas plej memorinda por la vilaĝanoj de Chenguantun.

Nemezurebla estas la saĝo de la popolo. Iu kooperativano nomata Liu Gui-nian, kiu iam laboris kiel riparisto de elektraj lampoj, mem faris konektotabelon anstataŭ aĉeti pretan, elspezinte nur pli ol cent jŭanojn kaj ŝparinte pli ol du cent jŭanojn. Kaj Li Shi-zhen, post mallonga lernado, jam scipovas manipuli la maŝinon kaj fari simplajn riparojn.

La tuta konstrukosto de la 21-ĉevalpova hidroelektrejo sumas nur iom pli ol 2,200 jŭanojn kaj dividite inter la 3,400 loĝantoj kostas al ĉiu nur malpli ol 0.7 jŭanon. Sed la elektrejo provizas movforton al muelmaŝino kaj kelkaj torniloj. Nun oni jam instalas elektrofadenojn por elektraj lampoj.

Jen la torĉo sur la ebenejo, kiu lumigas la vastejon ĉe la kanalo. Forirante de la hidroelektrejo, mi vizitis alian junulan hidroelektrejon ĉe Jixin-vilaĝo. La sekretario de la Komunisma Junula Ligo estis gvidanta pli ol cent ligojn kaj aliajn gejunulojn en fervora konstruado, kaj li diris al mi: “Ne reiru nun, nia junula hidroelektrejo de Chenguantun-distrikto jam finkonstruiĝos post unu du tagoj.”

\*Arbo el legumencoj — *Sophora japonica*.


# Fiŝprodukto en Guangdong-provinco

**E**KSTOS ega impetado en la fiŝa produkto de Guangdong-provinco. Laŭ la plano de koncerna institucio, ĝia jara produkta kvanto de 1962 liveros po 100 ĝinoj por ĉiu homo en la tuta provinco. Tiu cifero okupos tiam la duan pozicion de la mondo, malpli granda nur ol tiu de Japanio, kies pokapa kvanto en 1956 estis 110 ĝinoj.

## Riĉaj Suda Maro kaj Zhu-rivero

Guangdong-provinco sin lokas la 1-a en kvanto de la fiŝproduktado, kiu estas kvarono de tiu de la tutlanda jara produkto. La provinco situas ĉe la mondfama subtropika marregiono. La tuta areo de la Sudmara fiŝejo egalas al la grandeco de ses Guangdong-oj. Ĉi tiu vasta maro pleniĝas je diversspecaj fiŝoj kaj aliaj marproduktadoj. La

**Fiŝ-haveneto** *Lignogravuraĵo de Liang Yong-taj*



marbordo provizas bonajn marakvajn fiŝ-bredejojn.

Prosperiĝas ankaŭ freŝakva fiŝbredado interne de la provinco. En la baseno de Zhu-rivero interplektiĝas multaj river-branĉoj, abundaj je fiŝidoj. En la vilaĝoj oni vaste bredas fiŝojn en laĝetoj, kies tuta areo de 2,700,000 mu-oj estas la plej granda en la tuta lando. Tio estas la favoraj kondiĉoj por efektiviĝi la planon de ega impetado en fiŝproduktado.

## Granda Rikolto de Fiŝoj en 1957

En la jaro 1957, Guangdong-provinco havis senprecedence riĉan rikolton en fiŝproduktado, la tutjara produkto-kvanto sumiĝis je 683,000 tunoj, t. e. duoble pli multa kompare kun tiu de 1952, trioble, kun tiu de 1949; kaj plimultiĝis je 170,000 tunoj kompare kun tiu de la plej rikolt-abunda jaro de 1936 en la antaŭliberiĝa periodo.

La ĉefa ŝlosilo por la abunda rikolto de 1957 kuŝas en tio, ke en 1956 jam efektiviĝis kooperiĝo de la fiŝa produkto, la kolektiva forto de la fiŝistoj ja ludis sian rolon; ankaŭ la registaro multe helpis per distribuado de alpruntoj je pli ol naŭ milionoj da ĵuanoj kaj plintensigis samtempe la teknikan gvidadon. Dum la aŭtuna fiŝtjado en 1956, kaj la unua duono de 1957, la fiŝkooperativoj de la tuta provinco faris pli ol 3,100 novajn fiŝkaptajn ŝipojn, multaj el kiuj estas ekipitaj per motoroj. Lastjare apudmaraj fiŝejoj grandskale praktikis samtempe la plur-specajn metodojn de fiŝĉasado. Ili alterne faris fiŝĉasadon per retoj, ĉirkaŭigo kaj hokoj laŭ la sezonoj de diversa abundeco. Oni ankaŭ organizis fiŝ-ekspediciojn trans la maro. Tio multe mallongigis la ne abundan fiŝ-sezonon kaj ĉiuj fiŝejoj ĝuis riĉan rikolton.

## Ĉijara Printempa Riĉa Rikolto

Dum ĉijara printempa fiŝtjado, ĉiu fiŝprodukta kooperativo impetis en sia produkto, sur la bazo de lastjara riĉa rikolto. Aiguo-fiŝkooperativo en Guanghai, Taishan, kaptis en 5 tagoj sesoble tiom da fiŝoj kiom oni kaptis en la unua luna monato lastjare. La produkto de la subprovinca distrikto Shantou en januaro kaj februaro plimultiĝis 40%, kompare kun tiu de la sama periodo lastjare. Kvar ŝipetoj de la Aotougang-fiŝkooperativo de Huiyang-gubernio kune kaptis balenon de 50,000 ĝinoj dum sia unua ekspedicio.

Samtempe oni okupiĝis en konstruado de novaj ŝipoj. La fiŝkooperativoj de Wenchang-gubernio ĉijare jam finkonstruis 33 novajn ŝipojn. En la venontaj kvin jaroj konstruiĝos 18,000 fiŝŝipoj en la tuta provinco kaj ekipiĝos 4,000 ŝipoj per veloj kaj motoroj.

Granda reformo de fiŝkaptiloj ankaŭ efektiviĝas. Fiŝistoj de Huiyang- kaj Zhuhai-gubernioj vaste uzas jam la plej modernan fiŝkaptan reton faritan el nilono; kvin fiŝkooperativoj de Guanghai, Taishan, ankaŭ plektis multajn nilon-retojn antaŭ la printempa fiŝtjado ĉijara. La unua fabriko de polietilena plasto en Ĉinio jam konstruiĝas en Kantono. En la vintro venonta, kiam finiĝos la unua periodo de konstruado, estos ebleco grandkvante fabriki nilonretojn serve al la Sudmara fiŝproduktado. La fiŝistoj de la tuta provinco povos uzi poste nilonretojn por kapti fiŝojn.

### Riveroj, Akvokonservejoj Fariĝas Fiŝlagetoj

Bredado de freŝakvaj fiŝoj ankaŭ progresas per ne malpli rapidaj paŝoj. Lastjare, fiŝidoj estis rikoltitaj en eksterordinare granda kvanto, pretigante bonan fundamenton por ĉijara riĉa rikolto en freŝakva fiŝproduktado. Multaj agri-

kulturaj kooperativoj ĉijare antaŭ la periodo de fiŝida tajdo faris aktivan preparadon por konservi la fiŝidojn. Kiel ekzemple, Gaoyao-regiono okupiĝas pri plibonigo de la iloj uzataj por elakvigi kaj konservi fiŝidojn. Fondiĝos, tie du grandskalaj kulturejoj de fiŝidoj.

Oni ĉiel klopodas por plivastigi la areon de fiŝlagetoj. Kampanoj sur la delto de Zhu-rivero baras la riverfluan per movigeblaj kluzoj, farante 30,000 mu-ojn da riverfluo en fiŝlagetojn.

Pro disvolviĝo de akvokonservado, plejparte de la rizkampoj en la tuta provinco jam ne plu suferos de sekeco. Tial multaj kampanoj decidas bredi karpajn en siaj akvaj rizkampoj. Luoding-gubernio planis bredi karpajn en 130,000 mu-oj da rizkampoj. La montolagetoj kaj akvokonservejoj konstruitaj tra la tuta provinco dum la lastaj jaroj ankaŭ fariĝas bonaj bredejoj de fiŝoj. Laŭ la kalkulo de koncerna institucio, en la printempo de la venonta jaro, kiam malsekeco estos konkerita en la provinco, la areo de montolagetoj kaj akvokonservejoj uzeblaj por fiŝbredado tri- aŭ kvar-obliĝos. Oni ankaŭ proponas, ke Guangdong-provinco fariĝu en kvin jaroj "milĝina provinco" en fiŝproduktado, t. e. produkti freŝakvajn fiŝojn en lagetoj je mil ĝin-oj po mu-o.

Ai Ling:

## Universitato de Ruĝuloj kaj Specialistoj

**E**N unu frua somertago, ni vizitis la liberhoran universitaton de ruĝuloj kaj specialistoj de Zhaiquan-a Agrikultura Kooperativo en Henan-provinco.

Eksterordinare freŝa estis la aero de frua mateno. Humida bonodoro saturis la aeron super la kotonkampoj. Ore brilis la garbamasoj de tritiko. Tie sur la tritika draŝejo rotaciis la draŝmaŝino, ĉi-tie la vapormaŝino irigaciis ĉe la kotonkampoj, la traktoro kuris en la kampoj plugante la teron. . . . Ĉiuj tiuj-ĉi tondraj sonoj formis majestatan simfonion kaj sonadis tra la tuta vasta ebena en la frua mateno.

### Malmulta Elspezo sed Granda Entrepreno

Kie situas la Liberhora Universitato de Ruĝuloj kaj Specialistoj?

Se apud la pordoj de ordinara kampanaj domoj ne pendus la ruĝaj tabuletoj kun vortoj "Agrikultura Fakultato", "Meteorologia Fakultato",


"Ĥemia Fakultato", ktp. neniu povus ĝin trovi, ĉar tie ĉi ĉiuj domoj estas tute samaj. Tre simplaj estas la klasĉambroj. Krom kelkaj sloganoj sur la muroj, kelkaj tabloj kaj kelkaj senapogilaj benkoj faritaj el simplaj tabuloj, nenion alian oni povas trovi ĉi tie, eĉ ne nigrajn tabulojn.

K-do Wang, instruisto de la universitato gvidis nin al la esplora instituto de la diversaj fakultatoj. Ankaŭ ĝi estas en simplaj kampanaj domoj, destinitaj por eksperimentoj, esploroj kaj ankaŭ por preparado de lecionoj de la instruistoj.

En la unua ĉambro estas esploro de agrikultura fakultato. Elmontriĝas tie diversaj specimenoj de agrikulturaj plantoj ekz-e tritiko, koton, fabo ktp., kaj ankaŭ specimenoj de diversaj specoj de tero kaj malutilaj insektoj. "Krom por tiuj ĉi bildoj" diris k-do Wang montrante la bildojn sur la muroj, "ni elspezis nenion. Ĉiuj specimenoj estas faritaj per niaj propraj manoj."

Ĉe la pordo de agrikultura fakultato estis metitaj diversaj "florpotoj", "Ĉiuj tiuj ĉi estas por grefta





**Wang Mu lekcias pri kotonkulturado en koton-kampo**

*Foto de Zhang Su-yun*

eksperimentado," klarigis k-do Wang. "En tiu ĉi poto estas fazeolo greftita sur batato, por ke estu manĝeblaj ambaŭ fruktoj supraj kaj tuberoj mal-supraj. En alia poto estas kotono greftita sur balzamino. La ĉefa produkto de nia kooperativo estas kotono. Se tiu ĉi eksperimento sukcesus, tiam kreskus multekolora kotono, kaj ni havus indienon sen tinkturado." Kiel interesa kaj bela estas tiu ĉi eksperimento.

En la esplora ĉambro de Ĥemia Fakultato estis ankaŭ elmontrataj multaj ĥemiaj drogoj. Oni mem faris dentpudron kaj sapon. Tiam, tri junuloj estis okupataj en fabrikado de ĥemia sterko el segaĵo kaj urino sukcesinte en eksperimento. "Malmulta elspezo sed granda entrepreno" estas la komuna karaktero de ĉiuj fakultatoj.

### **Teknika Fakultato Samtempe Granda Fabriko**

La Teknika Fakultato estas en granda templo apud la vilaĝo, kiu estas plena de fero, ligno kaj diversaj instrumentoj, kaj kulturiloj, kvazaŭ ĝi estus granda fabriko kaj samtempe granda klas-ĉambro. La fakultatestro nin akompanante klarigis al ni: "Nia fakultato havas pli ol dudek studentojn. Ili estas ĉarpentistoj kaj forĝistoj de la kooperativo. Estinte, la ĉarpentisto povis nur ringi barelon kaj fari blovilon, dum la forĝisto nur fari fajrstangon aŭ ripari kulturilojn. Iujn fizikajn principojn ili komprenis, sed ne povis sin esprimi. Sed post lernado en la universitato, ili multe ŝanĝiĝas. "Praktiko" resumiĝas en teorion, kiu siavice direktas la "praktikon". Ĉies cerboj fariĝas klaraj, kaj plue oni kutimiĝas je kolektiva esplorado, tial pli kaj pli multiĝas kreaĵoj kaj inventoj." Dume ni alproksimiĝis al litforma instrumento. Kiam la fakultatestro funkciigis ĝin, unu segdisko tuj rapide rotaciis, kaj tre facile trasegis tabulon

dikan je tri coloj. "Per tio la laborefiko dekoble pli altiĝas ol dupersona laboro per mansegilo," diris la estro, "kaj nun oni daŭrigas esploradon por krei aŭtomatan rabotilon. Estas necese unue reformi laborilojn, antaŭ kreo kaj invento de agrikulturaj instrumentoj." Fakte ni vidis ankaŭ multajn plibonigitajn kaj inventitajn agrikulturajn instrumentojn, ekz-e la sepfoje-plibonigitan dusokan plugilon, la draŝmaŝinon, la facilmovan ĉaron ktp. . . . Ĉiuj ĉi tiuj estas tre ŝatataj iloj de la kamparanoj.

### **Instrui kaj Lerni en la Kampo**

La eksperimenta kamparo de la Agrikultura Fakultato estis tiel verda kaj prospera kiel ĝardeno. Viciĝas ruĝaj tabuletoj ĉe la kamparandoj kun la vortoj "Komparo de densa kaj maldensa plantado", "Komparo de ebena kaj ter-eĝa plantado", "Komparo de bonaj kaj malbonaj semoj" ktp. Ili instruis kaj lernis en la kulturejo. Kion bezonis la produktado tio estas ilia lerna tasko. Kaj tiel ili progresas ambaŭ teorie kaj praktike.

Iun tagon, pli ol kvindek studentoj kun rastiloj, plugiloj kaj pioĉoj alvenis al la batatkampo por ricevi lecionon pri plantado de batatoj. La instruisto estis Lü Xin-kuan, ĉefo de la kooperativo kaj samtempe estro de la fakultato. Ĉiuj studentoj sidis sur la tero, atente aŭskultis la lecionon pri la karaktero de batato, la supereco de ter-eĝa plantado kompare al la ebena . . . . Kaj poste la studentoj demandis: "Kio estas la plej taŭga distanco inter la vicoj de plantaĵoj?" aŭ "Kio estas la diferenco inter akvumado de ebena kaj ter-eĝa kampoj?" . . . . Ĉiujn tiajn demandojn respondis Lü Xin-kuan. Post tio kune kun kelkaj teknikistoj li montris la procedon de ter-eĝa plantado. Kiam ĉiuj bone komprenis, la studentoj komencis la praktikadon per siaj plugiloj, rastiloj kaj pioĉoj. Dume Lü Xin-kuan kaj la teknikistoj ilin direktis apude.

Post du aŭ tri tagoj, tiu ĉi progresiva metodo disvastiĝis, kaj en pli ol 470 muoj da batatkampo de la kooperativo plantiĝis batato laŭ ĝi.

### **Kurago en Pensado kaj Agado**

"Se ni gvidas agrikulturan produkton," Lü Xin-kuan diris, "unue ni mem devas forskui la katenon de la diro: 'produktado jam atingis la zeniton', kaj kuraĝe rompi la kutimajn regulojn." Li diris, ke ĉijare li entreprenis kvin muojn da altprodukta agro kaj planis produkti 150,000 kilogramojn da batato po muo. "Kio? 150,000 kilogramojn?" Tiu ĉi cifero ofte mirigis la vizitantojn, kaj ekscitis ilin al plurfoja demando kvazaŭ ili ne kredus al siaj oreloj. Tamen post kiam Lü Xin-kuan plene montris la eblecon, ili

fine konvinkigis admire kaj alte estimis ĉi tiun agrikulturan spertulon kuraĝan en la pensado kaj agado.

Ĉiuj spertaj, lertaj agrikulturistoj, labormodeloj kaj specialistoj konataj en la distrikto estas invititaj kiel instruistoj aŭ fakultatestroj de la universitato.

Wang Mu, labormodelo en kotonplantado de la provinco en 1958, estis nomita instruisto de Agrikultura Fakultato.

Mirinda estas tio, ke tiu ĉi instruisto, kiu neniam ricevis lernejan edukadon antaŭ liberiĝo kaj nur lasttempe liberiĝis de analfabeteco, sed post mallonga lernado en la universitato, jam povas lekci sisteme scienca teorion pri kotonplantado kaj scienca metodon kontraŭ malutilaj insektoj.

Tiu ĉi instruisto, havanta sperton de pli ol 40 jaroj en kotonplantado, ankaŭ decidis ĉijare produkti mil kilogramojn da sensemigita kotono

po muo en sia eksperimenta kampo. Tiu miriga iniciativo ankaŭ ricevis multajn laŭdojn de la vizitantoj.

Dum mallonga periodo de kelkaj monatoj depost la inaŭguro de la universitato, la studentoj de ĉiuj fakultatoj jam ricevis primarajn sciojn kaj teknikojn de sia fako. Ekzemple, la studentoj de Bestbreda Fakultato nun jam ellernis injektadon por bestoj; tiuj de Medicina Fakultato scias la simptomojn kaj kuracajn kaj preventajn metodojn de ĝeneralaj malsanoj, ĉiuj scipovas vakcini serumon de variolo, kaj multaj scipovis kuraci stomak-doloron kaj kapdoloron per la tradicia akupunktura kaj kaŭteriza terapioj.

Tia universitato, viveca kaj praktika, ricevis entuziasman aplaŭdon de la kamparanoj. Ili ĉiuvespere, kun lanterno en la mano, alvenas de ĉiuj flankoj al la universitato por aŭskulti lekciojn, eĉ tiuj loĝantaj kelkajn kilometrojn for de la universitato.

Fang Ji:

# Mirinda Rizprodukto

Same kiel la tritiko, ankaŭ nia rizprodukto ĉijare donis sinsekve novajn rekordojn, komence de pli ol tri mil, poste dek mil, dek ses mil kaj 52,599 ĝinoj po muo aŭ 294,4.925 kg. po aro, kiam ni presigis tiun ĉi numeron. Guan Musheng, estro de Changfeng-a Agrikultura Kooperativo en Hubei-provinco, estis la unua, kiu fiksas sian celkvanton super 10,000 ĝinoj po muo. En jena raporto la legantoj trovos kiel la mirinda produktivo de rizkampo efektiviĝis.

— La Red.

**E**KDE la kampanjo de socialisma antaŭensaltego, ĉie regas laborfervoro kaj klopodado por supreniĝo. Guan Mu-sheng, tutlanda agrikultura labormodelo, kiu unua altigis la rizprodukton po-muan super mil ĝinoj, cerbumis en si mem: “Per kio mi antaŭensaltu? En la pasinteco, la rizkampo donis maksimume 300 ĝinojn po muo, nun oni ricevas 3,000 ĝinojn, t.e. jam naŭoble pli multe. Ĉu eblas rikolti 10,000 ĝinojn po muo?”

Pri tio li pensis kaj pensis, sed ne kuraĝis ĝin eldiri, ĉar se li malsukcesus efektiviĝi sian vorton, kia labormodelo tiam li fariĝus! Li decidis en si fari sekrete eksperimenton, kaj nur en kampo de duona muo. Li fosis profunden je 1.2 ĉe-oj kaj multe sterkis la teron. Oni tuj tion rimarkis kaj demandis: “Estro Guan, ĉu vi faras eksperimenton? Kiom?”

Ĉe la komenco, li ne volis tion konfesi, ĉar

li ja memoris, ke, kiam li unuafoje eksperimentis por produkti 1,000 ĝinojn po muo, multaj homoj lin submokis, iu eĉ dediĉis morkanton al li:

Sur Draŝejo

Lignogravuraĵo de Yu Sha-ding



Ĉu iu foje vidis rizprodukton de mil ĝinoj,  
De dinastioj Tang, Song, Yuan, Ming, Qing ĝis  
ni?

Jen nia Estro Fanfarona kun obstino.  
Pretendas eĉ rikolti je dekonu pli!

Se nun li aŭdacus eĉ eksperimenti por dek mil ĝinoj kaj malsukcesus en la afero, ĉu li ne fariĝus vere Estro Fanfarona? Sed ĉiam pli multe da homoj venadis al li kun demandoj kaj li jam ne povis plu silentadi. Li fine starigis montratabulon sur la kampo kun surskribo: "Eksperimenta rizkampo de Guan Mu-sheng — duon-muo — por po-mua rikolto de 10,060 ĝinoj.

Tio konsternis multajn homojn, kiuj venis por rigardi la montratabulon — la tabulo estas malgranda, sed la afero ne simpla. Neniu kuraĝis ion diri. La kialo de la silentado estis malsimpla. Ne kuraĝis babilaĉi mokemuloj, ĉar estis ja tempo de la kampanjo de antaŭensaltado. Sed respondi al tia konkuro-defio estis malfacile, 10,000 ĝinoj po muo ne estas afero bagatela. Oni devis bone pripensi.

Sed iun matenon ne longe poste, subite aperis apud la kampo de Guan alia tabulo, sur kiu oni trovis la ciferon: 10,100 ĝinoj. Kvardek ĝinoj pli! La defirespondintoj estis ok knabinoj, kun Zhao Cui-yun, Yu Xiao-ying kiel ĉefoj. Sur la tabulo estis jena poemo:

Tondre sonas la alvoko: unu muo — dek mil  
ĝinoj!


Kiel fulmoj brilas ĝi terure — la cifero.

Sed klopu kaj ne timu, ĉiuj ni, fratinoj!

Nepre supervenki estron Guan — jen nia celo.

Neenirebla

Wang Hong



La du tabuloj staris unu kontraŭ la alia, kaj la du kampoj ankaŭ kunlimiĝis unu kun la dua. La tuta kooperativo tumultiĝis de la afero. Junuloj, virinoj, aĝuloj, eĉ infanoj, ĉiuj ekpensis pri dekmil-ĝina rizkampo kaj konkuri kun estro Guan.

Maljuna Guan tre ĝojiĝis. Li ne atendis, ke la duona muo sukcesos tiom agiti la amason.

Ĉi tie ni preterlasu la aliajn kaj rakontu nur pri la grupo de infanoj. En la 6-a brigado de Changfeng-a Agrikultura Kooperativo troviĝis 12-jara knabo nomata Hu Chun-lin. Li sentis, ke la vivo iom ŝanĝiĝis. De kiam oni komencis la eksperimentadon por dek mil ĝinoj da rizprodukto, nenie li povis trovi kunludantojn, ĉiuj homoj de la tuta kooperativo tag-nokte sin okupis sur la kampoj. Li fine kunvokis naŭ infanojn kaj post interkonsiliĝo decidis, ke ankaŭ ili tion entreprenu kaj petu kampon de la brigadestro, por eksperimentado. Tiam la penso de la brigadestro ankorau ne liberiĝis de antaŭjuĝo. Havante malestimon pri la infanoj li diris: "Vi ne tiel altas eĉ kiel la rizplantoj, kion vi povos fari por la dekmil-ĝina rizkampo?" Tiuj ĉi vortoj kolerigis la infanojn. La lastaj diris: "Kion povas fari la plenaĝuloj, tion ankaŭ la infanoj; la plenaĝuloj eksperimentas en kampoj grandaj, kial la infanoj ne en malgrandaj?" Ili forlasis lin kun kolero. Tamen ili ne estis malkuraĝigitaj, nek malesperigitaj, sed fariĝis nur pli decidemaj por la eksperimenta kampo.

Ili ĉie serĉis liberan teron, sed nenie ili trovis, ĉar ĉiuj terpecoj estis plenaj de plantitajoj, eĉ tiuj terpecoj apud la vojo aŭ kampoj. Ja kie oni trovus teron neutiligatan nun en vilaĝoj? Post vana serĉado ili decidis plugi la terpecon, kiu laŭ onidiro estas malnova tombejo. Dum la tago ili ne povis labori, timante la riproĉojn de la plenaĝuloj kaj ankaŭ la instrumentoj ne estis liberaj. Ili povis do fosi nur en la nokto.

La unuan vesperon ili fosis ĝis la nokta mezo. En dekona muo ili enfosis nur duonan ĉe-on. La duan tagon ili jam ne povis enfosi plu. Ĉar la tero estis neniam antaŭe plugita kaj tre malmola pro longa sekeco, tial tute ne cedema al fosiloj. La trian vesperon, ili priverŝis la teron per 120 sitelojn da akvo kaj sukcesis moligi la teron. Tiamaniere ili jam fosis pli facile kaj laboris ĝis la unua horo meznokte, atinginte la profundecon de 1.5 ĉe-oj.

Informite pri tio ĉi, estro Guan kaj la sekretario de la Distrikta Komitato de l' Partio kunvokis la infanojn kaj regalis ilin per po du bombonoj. La sekretario ŝerce diris: "Unu bombono por kvin mil ĝinoj da rizo, kontraŭ du bombonoj du dek mil ĝinoj. Ĉu konsentite?"



Tio estas tute neatendita por la infanoj. Ili ekridis pro ĝojo. Kaj tiam la sekretario demandis:

“De kie vi akiros la sterkon por via dekmil-ĝina eksperimenta kampo?”

“Ni mem kolektos!” respondis unu el la infanoj.

“Kaj kiel pri la sterka ĥemiaĵo? Via kampo ja ne estas bona . . .” aldonis la sekretario. Evidente li volis ilin helpi, sed ne diris rekte.

La infanoj rigardis unu la alian. Hu Chun-lin honteme elbuŝigis:

“Iom helpu la kooperativo . . .”

Guan Mu-sheng ekfrapis lian ŝultron kaj tuj skribis sur slipo por rajtigi al ili ricevi 30 ĝinojn da ĥemia sterko.

Ĉe tio la infanoj fariĝis ankoraŭ pli entuziasmaj. La sekretario plu demandis:

“Kaj pri la tekniko? Nura entuziasmo ne sufiĉas por atingi dek mil ĝinojn. Necesas ankaŭ tekniko, sed vi tion ne posedas . . .”

“Ni lernos, kion ni ne scias,” la infanoj ĥore interrompis. “Ni lernos ĝin de estro Guan!”

Tiuj vortoj ridigis Guan, kiu povas nur ripeti: “Mi instruos vin, mi instruos . . . , instruos . . .”

La afero de la infanoj tuj vaste disfamiĝis. Sed ne ĉiuj ilin fidis. Iuj demandis ilin: “Kio estas via devizo?” Ne antaŭpensinte pri tio, la infanoj povis nur diri: “Provizore ni ne diros ĝin al vi!” Vespere ili kunsidis. La duan tagon, sur la kampo ankaŭ stariĝis tabulo kun surskribo:

Ne la bonan kampon ni postulas, nek  
fabkukon\*\*,

Sed rikolt' po-mu' de dek mil ĝinoj—nia  
juro.

Ĉar herooj junaj kompareblas al Locheng-o†  
Estron Guan ni supervenkos en konkuro.

Baldaŭ la novaĵo venis al la Gubernia Komitato de la Partio, kiu trovis la aferon signifoplena, kaj interkonsiliĝinte kun Guan Mu-sheng, ili decidis kunvoki plenan kunvenon de kooperativanoj, ke Hu Chun-lin raportu pri ilia eksperimenta rizkampo por dek mil ĝinoj; por unue kuraĝigi la infanojn kaj due ankaŭ la aliajn. En la kunveno, kiam finparolis Hu Chun-lin, multaj homoj ekscitiĝis tumulte: “Ĉu ni vivus malpli indaj eĉ ol la infanoj!” Pli ol cent homoj tuj anoncis sin en la kunveno por fosi eksperimente 5 muojn da dekmil-ĝina kampo. En tri tagoj oni fosis profunden 1.5 ĉe-ojn. Oni ne povis libere paŝi en ĝi kaj la bovo staris kun abdomeno tuŝanta la teron, eĉ la durad-dusoka plugilo ne estas funkciigebla. Oni povis nur mem tiri la plugilon. Post pena laboro en du tagoj kaj unu vespero, la plantidoj estis finplantitaj.

Tiel Changfeng-a Agrikultura Kooperativo disvolvis grandskale la kampanjon por dekmil-ĝinaj eksperimentaj rizkampoj: de duonmuo al 5 muoj, de 5 muoj al 150 muoj; cetere de dek mil ĝinoj en du sezonoj al dek mil ĝinoj en unu sezono. Bolis laborentuziasmo ĉe la tuta kooperativanaro. Konkuroj disvastiĝis inter brigadoj, individuoj, patroj kaj filoj, geedzoj kaj fratoj.

Produkti en unu muo dek mil ĝinojn da rizo estas ja afero ne simpla, neniam okazinta en la dinastioj Tang, Song, Yuan, Ming, Qing. Ĉiuj komprenis, ke nura laboremo ne sufiĉas, necesas ankaŭ studemo, lernado de tekniko, kompreno pri la leĝo de la kreskado de rizplanto, por ke ĝi kresku laŭ la volo de l' homo.

Instigite de la Gubernia Komitato de la Partio, la kooperativo kunlabore kun la Teknika Disvastiga Stacio, fondis Dekmil-ĝinan Universitaton, kies estro fariĝis Guan Mu-sheng. Tie lernas jam 236 anoj. Sin-anonco por eniri en la Universitaton ankoraŭ daŭras. La principo de lernado estas ligi teorion kun praktiko, oni aŭskultas prelegojn en la universitato samtempe laboras sur la kampoj. Diplomon ricevos tiuj, kiuj povas atingi rikolton de dek mil ĝinoj kaj analizi la kaŭzojn de la sukceso. Ĉe la pordo de la Dekmil-ĝina Universitato skribiĝis poemo:

Establiĝis Dekmil-ĝina Universitato.  
Malaperis la konservativa penso aŭtomate.  
Saltis de mireg' doktoroj revenintaj de trans  
maroj,  
Sed la kamparanoj ridas, ĉiuj ĝoje kun huraoj.  
Nur impetu al labor' kaj same tiel al esploro;  
Eĉ dudek mil ĝinoj estos atingeblaj dank' al  
nia fervoro.

\* Pri ĉinaj mezur-unuoj oni legu la specialan artikolon en tiu ĉi numero.

\*\* Fabrekremento uzata kiel sterko.

† Juna bravulo de Tang-dinastio el populara historia romano.




**K**AVA-NACIO, unu el la naciminoritatoj en Ĉinio, konsistas el pli ol 280,000 personoj dissemataj en la sud-okcidenta parto de Yunnan-provinco.

La lokoj loĝataj de kava-oj, estas en monta regiono, kiun oni ĝenerale nomas "Kava-monto". En tiu regiono, tre malmulte da ebenajoj oni povas trovi. Malgraŭ tio, ke la tuta regiono kuŝas en subtropika zono, la klimato en diversaj lokoj multe varias laŭ la alteco: tiu ĉe montpiedoj kaj rivervaloj estas varmega, ĉe montoflankoj milda, kaj ĉe montosuproj kompare malvarma. Pro la diversseco de la klimato en tiu ĉi regiono plantiĝas tre diversaj kreskajoj, kiel rizo, maizo, fagopiro, fabacoj, kotono, juto, agavo, teo, ktp. Ĉie etendiĝas naturaj paŝtejoj verdaj tra la tuta jaro, idealaj por la disvolviĝo de bestobredado. Krome, en la sino de Kava-monto sin kaŝas ankaŭ riĉaj mineraloj, precipe arĝento, kiu estis ekspluatata jam frue en Ming- (1368-1644 p.K.) kaj Qing- (1644-1911) p.K. dinastioj.

Ne troviĝas skribita historio de Kava-nacio. Laŭ ĝiaj popollegendoj ĝi estas nacio kun longa historio. Iuj diris: "La kava-oj elrampis el la sama lagenario\* kune kun la han-oj, taj-oj kaj lahu-oj." Aliaj diris, ke Zhuge Kongming (181-234 p.K.) la eminenta politikisto en Han-dinastio iam venis al la regiono de la kava-oj, sekve la domoj de la kava-oj konstruiĝis laŭ lia ĉapformo. Kaj multaj rakontoj kaj legendoj pri Zhuge Kongming tradicie transdoniĝis ĝis hodiaŭ. Tiuj ĉi rakontoj kaj legendoj montras al ni la longdaŭran intiman rilaton inter la diversaj nacioj en Ĉinio.

Antaŭ la liberiĝo, kvankam la tero, kiu estis la ĉefa produkta rimedo en la kava-regiono, jam fariĝis privata posedaĵo kaj en la socio jam montriĝis diferencigo inter riĉuloj kaj malriĉuloj, tamen escepte en certaj lokoj, la agroj ankoraŭ ne centriĝis grandnombre en la manoj de la riĉuloj, nek troviĝis ekspluatado per terluado. La vendo kaj aĉeto de agroj jam komenciĝis antaŭ dekoj da jaroj, sed la prezoj estis tiel malaltaj, ke kontraŭ du aŭ tri kokinoj oni jam povis interŝanĝi pecon

### Rizkampoj en la Kava-monto plimultiĝas



Liang Fen:

# Transsalto Rekte

da tero, sur kiu unu aŭ du dekalitroj da semoj povas esti dissemataj. Nur parto de 1' riĉuloj dungis kelkajn taglaborulojn kaj havis en la hejmo foje malmulte da sklavo. Escepte de la malmultaj sklavo preskaŭ ĉiu havis sian agron. La kava-oj estas laboremaj, kaj ĉiuj homoj, ĉu riĉaj aŭ malriĉaj, viroj aŭ virinoj, kapuloj (gentestroj) aŭ popolanoj, rigardas laboremon bona virto kaj volonte partoprenas en laborado. Sed tiam la nivelo de ilia produktivo estis tre malalta. Ĝenerale ĝi ankoraŭ restis en la stato de "alternativa aŭ nomadeca terkulturado kun principo de vasta semado kaj malabunda rikoltado". Kelkloke oni ankoraŭ konservis la metodon de "kulturado perglava kaj semado post herbobruligo". Iliaj produktiloj estis tre primitivaj. Ordinare oni havis nur unu glavon, unu plugilon kaj unu malgrandan sarkilon por fortranĉi herbaĉojn. La agroj ili ne sterkis, la semoj ne estis selektataj; malutilaj insektoj, ne forigitaj kaj bovoj, malofte utiligataj en terkulturado. Sekve la laborefiko estis malalta kaj la rikolto, malgranda. En la Kava-regiono estis ankoraŭ konservataj tribecaj organizaĵoj, kiuj ĉiuj havis sian kapulon aŭ elektitan aŭ hereditan. Inter la triboj ne maloftis senkapigoj pro malamikeco unu kontraŭ la alia kaj ofte okazis armitaj interbataloj.

En la jaroj sub la Kuomintanga reakcia regado, Kava-nacio multe suferis. La reakciuloj ne nur ofte sendis soldatojn por prirabi ilin, sed ankaŭ incitis konfliktojn kaj armitajn interbatalojn inter la kava-oj mem aŭ inter ili kaj anoj de aliaj naciminoritatoj. Kontraŭ la perfortaĵoj de Kuomintango eksplodis multfoje senkompromisaj kontraŭstaroj de la kava-oj.

La regiono de Kava-nacio estis liberigita en 1952. Kvankam forpasis apenaŭ ses jaroj, la aspekto de la socio jam ege ŝanĝiĝis.

Post la liberiĝo la kava-oj jam plene ĝuas politikan rajton de nacia egaleco. Nuntempe ĉu en la Tutlanda Popola Kongreso aŭ en la Popola Kongreso de Yunnan—provinco, Kava-nacio havas siajn proprajn delegitojn". En distriktoj, kie loĝas intermiksita hava-oj kaj anoj de aliaj naciminoritatoj, fondiĝis en 1954 Menglian-a Aŭtonoma Gubernio de Taj-, Lahu- kaj Kava-nacioj, kaj en 1955 Gengma-a Aŭtonoma Gubernio de Taj- kaj



# al Socialismo

Fotoj de Wang Chuan-guo

Kava-nacioj. La Partio kaj la Popola Registaro ankaŭ donis sian altan prizorgemon pri la produktado kaj vivo de Kava-nacio. En la lastaj jaroj, la Registaro asignis grandajn sumojn de prunte-dono, de monhelpo kaj de subvencio por montre-giona produktado. Grenoj, salo, agrikulturaj instru-mentoj, semoj ktp. estis vendataj en tiu regiono je tre malaltaj prezoj. Sub la konkreta helpo fare de la kadroj de Han-nacio kaj aliaj nacioj, la produkta tekniko de Kava-nacio ankaŭ progresas senĉese. Multaj kava-oj ellernis la agrikulturajn teknikojn: ellabori irigaciatajn rizkampojn, transplanti rizplantidojn, trempi semojn ktp. por anstataŭi la malnovajn kutimojn. Krome, la areo de kulturata tero estas pligrandigita. Nur en Cangyuan-gubernio la areo pligrandiĝis je pli ol 94,000 muoj de 1952 ĝis 1955 kaj en 1956 la produkto-kvanto de la tuta gubernio pliiĝis je 88.2% ol en 1952.

Antaŭ la liberiĝo, Kava-nacio ne havis sian skriban lingvon, nek lernejojn. La inteligentuloj de Kava-nacio estis nur la *moba-oj* (sorĉistoj), kiuj povis reciti parkere la historiajn legendojn de sia nacio. Nuntempe, sub la helpo de la Registaro estas starigitaj en Cangyuan-gubernio 23 elementaj lernejoj kun pli ol 2,500 gelernantoj, kaj en Ximeng-montregiono 7 elementaj lernejoj kun pli ol 500 gelernantoj. Por pli rapide ŝanĝi la kulture postres-tintan staton de Kava-nacio, la Partio kaj la Registaro kreis por ĝi skriban lingvon.

En la pasinteco Kava-nacio ne havis kuracis-tojn. Ilia ununura rimedo por kontraŭbatali malsanojn estis oferado de brutoj al la demonoj plenumata de la *moba-oj*. Post la liberiĝo la Registaro multe zorgis la higienajn laborojn. En lastaj jaroj fondiĝis en Cangyuan-gubernio 1 hospitalo, 3 kŭracejoj kaj 1 sanitara centro por patrinoj kaj infanoj. Jam pli ol 100,000 pacientoj (laŭfoje) estas kuracitaj senpage en tiuj higienaj organizoj ĝis la komenco de 1958. Similo okazas ankaŭ en aliaj lokoj de la kava-regiono.

Krom tio, pli granda kaj pli grava transformi-ĝo de Kava-nacio estas la kooperativiĝo de agri-kulturo. En 1956, en Cangyun-gubernio prove fondiĝis 15 agrikulturaj kooperativoj kaj en Ximeng-montregiono, 1 agrikultura kooperativo. Al tiuj kooperativoj la Registaro donis grandan



Han-nacianoj instruas al kavaoj plantadon de riz-plantidoj

helpon. Ekzemple, nur de marto ĝis septembro, 1956, la Kava-a Agrikultura Kooperativo en Wonu-vilaĝo de Ximeng-monto ricevis de la Registaro 3,000 ĝinojn da helpa greno. Progresaj agrikulturaj scioj estas instruataj al kava-aj kooperativanoj. En la unua jaro la po-mua produkto jam plimultiĝis je duoblo de la antaŭa. La kooperativo en Wonu-vilaĝo jam fariĝis standardo inter la kava-oj en Ximeng-montregiono. Estiĝis jam alta tajdo por kooperativiĝo inter la kamparanoj de Kava-nacio en multaj distriktoj.

*\*Frukto de kukurbaca vegetaĵo, kies ligneca ŝelo senigita de internaĵo povas esti utiligata kiel ujo.*

## Lernas kavaoj dum ripozo





# *Du Poemoj de Maŭ Ze-dung*

## *Jinggang-monto\**

*Sube videblas flagoj densaj, kaj surmonte  
Resonas la tambur-trumpeta batalvoko.  
La malamikoj nin sieĝas en mil kaj mil vicoj,  
Tamen, ni staras ĉiam kiel firma roko.*

*Delonge pretis jam defend-aranĝoj ĉiaj,  
La unueca vol' — remparo plej fortika —  
Jen la kanonaj muĝoj ĉe l' Huangyangjie-  
front' \*\* anoncas  
Dumnoktan fuĝon de la hordo malamika.*

## *Kunlun†*

*Ĉielen sin levante super vasta spaco,  
Kunlun giganta  
Printempojn vidis jam sennombrajn en la homa  
mondo.*

*Sub neĝo, kvazaŭ milionoj da arĝentaj drakoj,  
Ĝi froston ŝutas al la tuta horizonto.  
Dum la degela tempo de somero  
Kiam riveroj ĉie superakvas,  
Homoj amase pereadas en inundo.  
Kia ja kulpo estas? Kia ja bonfaro?  
Kiu prijuĝi povus iam dum miljaro!*

*Nun diras mi al la montego Kunlun:  
Tian altecon mi ne ŝatas,  
Nek tiom da neĝoamaso pli.  
Min apogante sur ĉielo, longan spadon volus mi  
eltiri,*

*Kaj vin distranĉus jam en partojn tri:  
La unu mi donacus al Eŭropo,  
Al Ameriko la alian,  
Sed nur la tria restu en Ĉini'.  
Tiam sub la regado de mondopaco  
Komunos ĉie la temperatur-vari'.*

**Tradukis Xu Sheng-yue**

\* Jinggang (pron.: ĝinggang)-monto situas ĉe la limo de Jiang-xi- kaj Hunan-provincoj. En septembro, 1927 prezidanto Maŭ komandante la Laborista-Kampanan Ruĝan Armeon starigis tie la unuan revolucian militbazon. Ek de tiu tempo ĝis en la jaro 1928, la reakcia armeo faris plurfoje atakojn al ĝi.

\*\* En la batalo priskribita de la poemo, prezidanto Maŭ fermis ĉiujn vojojn al Jinggang-monto krom tiu tra Huangyangjie (pron.: Hŭangjangĝje), por logi la malamikon enprofundiĝi en antaŭfiksitan lokon kaj ĝin frakasi. † Nomo de la monto, kiu situas ĉe la supra parto de Yutian-rivero, Xinjiang-provinco, kaj ankaŭ tiu de la tuta montaro, kiu komenciĝas ĉe Pamiro kaj etendiĝas orienten laŭ la limo de Xinjiang kaj Tibeto ĝis Qinhai-, Sichuan-kaj Gansu-provincoj. Ambaŭ la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero trovis sian fonton ĉe tiu ĉi montaro, kies altajn montpintojn kovras neĝo. Nutrate de la montaro la nomitaj du riveregoj liveras bonfare la akvon kaj abundecon al ĉinoj, sed samtempe ankaŭ ilin suferigas per inundoj.

## *Kelkaj Novaj Popolkantoj*

### *Grandega ja Estas Krefoto de Ni*

*Grandega ja estas kreforto de ni,  
rompiĝus ĉielo je tuŝo de ĝi,  
fendiĝus la tero je ĝia ekbat',  
la maro nin servos jam kiel jugat'.  
Transloki montegojn — nenio por ni,  
ĉielo-ripar' — kolhozana meti',  
tersplitojn refliki — en nia povsci'.*

*Sub gvido de l' saĝa Partia lum-vort',  
la fort' kolektiva — giganta krefort'.*

### *Supere Ne Estas Ĉiela Reganto*

*Supere ne estas ĉiela reganto\*,  
surtere ne estas di-draka giganto\*\*;  
mi mem la ĉiela reganto,  
mi mem la di-draka giganto.*

Vi, ĉiuj montegoj, voj-cedu,  
ke mi plu impetu!

## Time Flugas For la Fiŝbirdaro

Time flugas for la fiŝbirdaro —  
jen rapide venas sterkboato.  
Ĝi disflugas stelojn en rivero —  
kaj elvekas fumon el kameno.

Jen rapide venas sterkboato.  
Gaje ritmas kant' kun padelado.  
Ĝi traflugas salik-nubojn,  
en flor-montojn malaperas.

## Nun Popolkantoj Tre Tre Riĉas

Nun popolkantoj tre tre riĉas,  
por mil grenejoj plene sufiĉas.

Ne ilin rigardu nuraj vortoj,  
en kampoj grenoj ili fariĝas.

Por terplugado piotoj bonaj,  
por popolkanto voĉoj belaj.  
Kantistoj nun ni ĉiuj estas  
eĉ riveregon retropelaj.

\* Reganto super ĉiuj dioj laŭ ĉina mitologio.

\*\* Dio reganta super akvoj kaj akvaj bestoj.

(Daŭrigo sur P. 150)



Wei We i:

## Noto en Pekino

De la konstruejo mi revenis,  
Mia vest' de polvo plenis,  
sur vizaĝo rid' serenis.

Revis mi pri l' vinbermontoj  
kaj rozvaloj  
baldaŭ l' lagon brakumontaj.

Mi kantadis kun aspiro  
dum vojiro.  
Jen alŝvebis ĥora trilo.

O, vojrande  
grilkaĝetoj staras stande,  
kvazaŭ urbo muzikanta.

La verdrobaj, longantenaĵ,  
muzikistoj kampdevenaj  
ja muzikas tiel vervoplenaj.

Kiel ja allogaj  
estas la kaĝetoj  
el la ruĝaj tigoj sorgaj!

Kaj tuj prezon mi enketis,  
oni tre malmulton petis  
kaj do kelkajn mi aĉetis.

En la kapo jen' ekscenas:  
Ekvidinte la kaĝetojn,  
tuj el dom' fileto fluge venas.

Sed en la moment' dirita  
Venis la inform' subita —  
jam Libano de Usonaj armeanoj invadita.

Jen subite al mi en la manoj  
plipeziĝis la kaĝetoj  
je kelk-kilogramoj.

Ĉielranden mi rigardas,  
mia kor' al mi doloras,  
de koler' kaj de malamo ardas. . .

Tiam la griloj ree ĉirpis,  
sed ĉifoje kiom ĝenis!  
Kvazaŭ en momento  
ilian belan voĉon iu forŝtelis!

Tiam,  
ege mi deziris —  
ilin enmanigi kaj premsufoki,

ke l' tutmonda infanaro  
ĝuu grilmuzikon en la lito  
kaj plenkresku sen amaro.

Elĉinigis Laŭlum

**L**A hejmon mi alvenis hieraŭ, kaj min vizitis vespere multaj kooperativanoj. Duono de la nokto forpasis en agrabla interbabilado. Ili informis min pri la eltenemo kontraŭ malfacilaĵoj kaj pezaj laboroj montrata de la kadroj, kiuj venis al la kamparo por sin hardi, kaj ankaŭ priridis la anekdotojn de tiuj intelektuloj nove venintaj.

“O! Krome estas ankaŭ tiu mia metilernanto,” eklaŭtigis sian voĉon avo Sun Qun-chang, superante ĉiujn aliajn voĉojn en la tuta ĉambro. “Ja estas amuze: Antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi argumentis kun Gu Yu-heng, mi menciis, ke mi antaŭe posedis nur unu bovkruron. Post la kunveno li sekrete alparolis min: ‘Avo Sun, kiel laboris via unukrura bovo?’ La rideksplodego, kiun kaŭzis al mi lia naiva demando, plene ruĝigis la junulon. Mi klarigis: ‘Ĝi ne estis bovo kun ununura kruro. Ĝi estis bovo komune posedata kaj nutrata de kvar familioj— tial mi posedis nur unu bovkruron. Kompreninte kion mi aludis, li iom palpis sian vizaĝon kaj diris: ‘O! Do vi posedis nur kvaronon de la bovo!’ Li tre ĝojis ekkompreninte tiun kamparan esprimon kaj ne sentis sin ofendita de mia ridego.”

La maljunulo Sun Qun-chang posedas eksterordinaran kapablon en terkulturado. Riĉan sperton li heredis de sia patro kaj mem ankaŭ cerbume esploris kun granda peno en tiu flanko dum sia tuta vivo. Oni povas diri, ke li dediĉis sian tutan vivon al tritiko, milio, sorgo ktp. Antaŭe, tuj post la fino de 1' printempa pluvo aŭ ĉe la ekblovo de la aŭtuna vento, oni ĉiam iris al li por peti necesajn konsilojn. Sed li kutime respondis: “Terkulturaĉo estas laboro de kruduloj. Da sterko multe, da pluvo multe, ne necesas iri konsulte. Kelkaj profitas el frua semado, tamen, ankaŭ gajnas aliaj kiuj semas malfrue. Validas neniu fiksita regularo.” Sed fakte en si mem li havis diferencajn metodojn ĉu por printempa semado, ĉu por aŭtuna rikoltado, konforme al la kvanto de 1' pluvado kaj la irado de la sezono. Sed liajn metodojn li ne volis malkovri aŭ plene malkovri al aliuloj. La kaŭzon li malkaŝis nur lastatempe: “Nun la koroj de homoj estas malsamaj ol antaŭe. En la pasinteco mia koro estis ja malinda: mi ne volis helpi aliajn. Pro kio? Pro mia propra bono! Komprenu, se ĉiuj havos abundan rikolton, la greno malkariĝos, kaj sendube mi el tio malprofitos.”

“Nu, kiel progresas la lernado de Lu Fei dum la lastaj tagoj, avo?” scivoleme demandis Gu Zhen-hai, la sekretario de la vilaĝa komitato de Komunisma Junula Ligo. Avo Sun viglahumore daŭrigis:

“Nenio estas pli facile trapenetrebla ol la koro de la junulo. Kiel fenestra papero, ĝi truiĝas ĉe

malforta tuŝeto kaj tuj enlasas lumon. La unuan fojon li demandis min pri notindaĵoj en terkulturado. Mi unue sciigis al li la nomojn de la dudek-kvar tempodividoj de la jaro. Zorgeme li enskribis ilin en notlibron, kiun ĝi metis en sian poŝon. Tiam mi senceremonie alparolis lin: ‘Ne utilas ilin noti en la libro.’ Pli bone ilin noti en la kapon! Se iunokte, nepovante endormiĝi, vi volas cerbumi pri la laboro de la kampo, ĉu vi efektive eklumigus la lampon, vin vestus kaj elserĉus la notlibron ie el kesto?’ Admonite, tiun saman vesperon li ellernis tuj parkere ĉiujn 24 nomojn de 1' tempodividoj.”

*Gu Yu:*

## *Avo Sun*

“Kiam Avo Sun estis finonta sian parolon, Li Huan-wen, instruisto de elementa lernejo, aldonis alian demandon:

“Kiam Lu Fei povos fini sian lernadon laŭ via opinio?”

“Kun paso de kelkaj monatoj, ĉio, kion mi scias, estas baldaŭ elĉerpota de li.”

“Do vi devas doni al li diplomon, ĉu ne?”

“Neeble! Estas proverbo: ‘Neniu povus ellerni la terkulturaĉon en la daŭro de malpli ol unu jaro.’ Plie, ni ambaŭ devas esti gradigitaj samtempe! Mi fininstruos al li kiel plugi kaj falĉi per plugilo kaj falĉilo, dum li al mi, kiel legi kaj skribi, kaj krome, la sciencajn sciojn. Estas tiom granda provizo da bonaĵoj en la cerbo de Lu Fei: ‘nitrogeno’, ‘fosforo’, ‘kaliao’, kaj cetere li konas sciencon pri la grundo kaj meteorologion. En lia kapo ŝajnas esti eta magazeno. Mi nepre aĉetos ion de li pogrande. . .”

“Lasu! Tian aĝon vi jam havas, kaj volas ankoraŭ laŭmodiĝi!” diris Gu Jun-xiu, kiu kutimis ŝerci kun li.

“Ne malestimu min pro mia aĝo, Jun-xiu! La malnova terpotato eble supervivos vian cipresan sitelon. Neniu scias ankoraŭ, kiu el ni du finfine portos la ĉerkon de la alia.”



Efektive, kvankam li aĝas jam sesdek kvin jarojn, tamen lia korpo estas tre fortika. Nek kurba estas lia brusto, nek ĝiba lia dorso. Nek surdiĝas liaj oreloj, nek nebuliĝas liaj okuloj. En liaj propraj vortoj: "Ĉiu mia korpoparto estas en bona ordo; eĉ la ungoj estas pli malmolaj ol tiuj de aliuloj."

En la jaro, kiam fondiĝis la unuagrada kooperativo en mia naskiĝvilaĝo, mi revenis hejmen dufoje. Ĉiun fojon li venis interbabili kun mi, por koni pli precize la politikon. Tiam li ankoraŭ ne aliĝis al kooperativo. Kun kuntiritaj brovoj li ĉiam ripetis la demandojn al mi: "Ĉu la aliĝo estas

## Qun-chang

deviga aŭ laŭvola?" Kaj krome: "Mi intencas adopti iun nevon, ĉu tio estas permesata?" Tiun jaron mi rimarkis, ke li portis la unuan fojon peltan robon kun griza surfaco el kotona teksaĵo kaj bukraj lanharoj sin montrantaj el sub la malsupraj randoj de ambaŭj baskoj. En la dekstra mano li tenis bastonon kaj la maldekstran li metis dorsflanke. Liaj paroloj estis ĉiam memkontraŭdiraj. Aŭskultante aliulojn, li ĉiam alproksimigis sian oreton al la buŝo de l' parolanto, laŭte demandante: "Kion vi ĵus priparolis?" Tiutempe li impresis, ke li efektive maljuniĝas kaj eĉ tiel rapide.

En la printempo de la antaŭlasta jaro, kiam okazis la inaŭgura kunveno de la altgrada kooperativo, kiel oni diris al mi li subite suriris la podion antaŭ la fino de l' ceremonio kaj faris paroladon, en kiu ĉiu frazo vekis ĉe la aŭskultantoj miregon kaj entuziasmon. Li diris al la vilaĝanoj: "Mi Sun Qun-chang postrestis hontinde. La valoron de kooperativigo mi ekkomprenis nur hodiaŭ. Estante senida maljunulo, mi forte timis antaŭe, ke se miaj posedaĵoj estos transdonitaj al la kooperativo, neniu zorgos poste pri ni, la maljuna paro. Tial mi intencis reteni miajn dekkelkajn muojn da tero kaj la bovon, por ke mi povu trovi iun adoptiton, kiu prizorgos nin ĝis nia

morto. Mi timis, ke eble oni tirus min en la kooperativon kaj petus min respondeci la teknikan fakon, kaj tiam mi ne povus rifuzi, kvankam mi neniel volis esti tro agema. . . Nun mi vidis kaj komprenis ĉion: la kooperativo estas vere bona. Ĝian bonecon mi ne mencios ĉi tie. Hodiaŭ mi aniĝas al la kooperativo, transdonante al ĝi ĉion mian: la agrojn, la bovon, la ĉaron kaj min mem. Mi ne serĉos adoptiton plu, ĉar vi gejunuloj estas ĉiuj miaj idoj." Lia voĉo estis pli sonora ol antaŭe kaj ĉiuj aŭskultantoj malsupre fiksrigardis lin gapante.

". . . Kiam mi ne plu povos moviĝi, estos neeble, ke vi ne alportos al mi akvon por trinki."

"Ni respondos ĉion pri vi!"

"Kiam la socialisma socio efektiviĝos, la akvokondukilo instaligis ĝis via elektra forno!"

Kriadis ĝojoplene la gejunuloj malsupre.

"Ne timu, ke mi ĝenos vin per mia konsumado kiel duonmortulo sen laborkapablo. Kontraŭe, mi ankoraŭ povos labori por la socialismo almenaŭ dek jarojn! La kadukecon mi nur ŝajnis por vin trompi. "Kun la vorto li forjetis sian lambastonon sur la tegmenton de apuda domo. Demetinte la peltan robon, li ree streĉis sian talion fortike kaj rekte.

Bedaŭrinde tiun jaron mi estis malproksime for de mia naskiĝloko. Se mi ĉeestus tiun kunvenon, mi certe klakŝveligus miajn manplatojn pro li.

Post eksalvo da ĝojaj ridegoj en mia ĉambro, avo Sun daŭrigis la defion kontraŭ Gu Jun-xiu: "Jun-xiu, ĉu vi ne diris, ke mi estas maljuniĝinta? Okaze de la antaŭensaltego, lasu nin rivali! Mi jam fiksis nian celon kun mia metilernanto: atingi la produktokvanton de 1,500 ĝinoj da printempa maizo po muo. Ĉu vi kuraĝus levi la manon?"

La ĉeestantoj en la tuta ĉambro kuraĝigis lin: "Akceptu la defion, Jun-xiu!"

Jun-xiu respondis: "Mi ne kuraĝas. Kiam maljuna terkulturisto unuiĝas kun inteligentulo, eĉ 2,000 ĝinojn ili kapablos produkti."

Aŭdinte tiujn vortojn, avo Sun iom kvietiĝis: "Mi ankaŭ konjektis, ke vi ne kuraĝas. Atendu, ĝis ni estos kreintaj spertojn por vi ĉijare, kaj vi plantu printempan maizon, venontjare! Ne estu tro senpripensa, junulo!"

\* En tiaj kooperativoj la membroj konservas al si la posedrajton de sia tero, dum en la altgradaĵoj la teron posedas kolektive la kooperativo.

# La Origino de la Homo

POST la kreiĝo de la mondo, inter la ĉielo kaj la tero troviĝis jam montoj, riveroj, herboj kaj arboj, kaj eĉ birdoj, bestoj, insektoj kaj fiŝoj; sed troviĝis tiam neniu homo. Foje la granda Diino Nüwa paŝis sur la senhoma tero kaj trovis ĝin senviveca kaj sentis sin ege soleca. Ŝi opiniis, ke sur la teron oni devas ion aldoni.

Tion pensinte ŝi kaŭris kaj elfosis iom da tero. Kaj ĝin miksis kun akvo ŝi knedis el ĝi etan homfiguron. Tiu figureto tuj ekvivis, ekkriis kaj saltis kiam ĝi estis surmetita sur la tero. Ĝi ricevis la nomon "homo". Kvan-kam la homa figuro estis malgranda, sed ĝi estis kreita de la Granda Diino, tial ĝi iel similis al la Diino kaj multe diferencis de la birdoj kaj bestoj. Kontenta je sia kreaĵo Nüwa daŭrigis sian laboron kaj faris multajn homojn. Ĉu vira ĉu ina ĉiu el ili estis nuda. Ili

ĝoje kriis kaj saltis ĉirkaŭ la kreintino Nüwa, kaj poste ili ĉiuj disiris are aŭ unuope.

Ŝi volis ke tiuj lertaj kaj viglaj kreaĵoj pleniĝu sur la tero. Sed la tero estis tro granda. Ŝi longe laboris, sed ne povis facile atingi tian celon, kaj jam sentis lacigon. Fine ŝi desiris branĉon de rampanta kreskaĵo kaj ĝin trempinte en koton, eksvingis en la aero. Jen sennombraj kotgutoj falis teren, kaj kiom da kotgutoj defalis tiom da homoj estiĝis tuj sur la tero. Kaj tiamaniere baldaŭ la tero pleniĝis de la homoj.

Sed la laboro de Nüwa ne haltis tie. Ŝi pensis, ke estas tro maloportune, se ŝi devos fari ĉiam novan anstataŭanton por ĉiu mortinta homo. Tial ŝi parigis la virojn kun la virinoj kaj ordonis ilin mem krei kaj varti siajn infanojn. Tiamaniere la homo daŭras ekzisti de generacio al generacio, kaj ĝia nombro eĉ pli kaj pli multiĝas.

## Juro


ESTIS oficisto, kiu monon avidis sed hipokritis malinklinon al koruptiĝo. Kiam li estis enoficigata, li ĵuris al la ĉielo: "Se mi akceptus subaĉeton per mia maldekstra mano, putriĝu al mi la maldekstra mano; se mi akceptus ĝin per la dekstra, putriĝu la dekstra!"

Pasis kelka tempo post lia enoficiĝo, iu korupte donacis al li cent taelojn da arĝento, kiun li tre deziris akcepti. Sed li rifuzis: "Tio estas neakceptebla; mi ĵuris, ke putriĝu mia mano pro akcepto de subaĉeta mono!"

Jam delonge konante lian internan korinklinon, lia subulo rekomendis al li rimedon: "Akceptu la arĝenton per via maniko! Tiam, se efektiviĝos la juro, difektiĝos ja nur la maniko."

La koruptiĝema oficisto trovis la proponon tre saĝa, kaj agis tute laŭ la konsilo.

El "Rakontoj de Xuetao"



# Tio Ne Estas Mia Afero

**I**U ĥirurgo fanfaronema pretendis, ke li povas kuraci diversajn malfacilajn malsanojn. Oficiro, kiu estis trafita per sago dum batalo, lin konsultis.

La ĥirurgo fortondis, per tre akra tondilo, la sagovergeton videblan ekstere. Li opiniis, ke li

jam plenumis sian devon kaj petis honorarion de la oficiro.

“La sagopinto ja ankoraŭ restas en la karno,” diris la oficiro, “kion fari?”

“Iru al kuracisto de interna fako,” la alia respondis, “ĉar tio ne estas afero por ĥirurgo, kiu zorgas pri la ekstero!”

*El “Rakontoj de Xuetao”*

## Paĝo el la Ĉina Historio:


# La Militantaj Regnoj

## A. La Ekonomia Disvolviĝo

De la jaro 475 a.K. ĝis 221 a.K. estis la Epoko de l' Militantaj Regnoj, en kiu la ĉefaj regnoj estis nur Qi, Chu, Yan, Han, Zhao, Wei kaj Qin, ĉar multaj princlandoj jam malaperis, rezulte de l' aneksaj militoj dum la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno.

La regnoj Han, Zhao kaj Wei devenis el la regno Jin splitiĝinta ĉe la fino de la 5-a jarcento a.K. Yan-lando, kiu okupis la nordan parton de la granda ebena de Norda Ĉinio ĝis Liaodong-duoninsulo, fariĝis granda regno nur fine de la kvara jarcento a.K.

**Vasta Uzado de Feraĵoj** En la pritraktata epoko estis multe pli vasta la uzado de feraj instrumentoj ol en la antaŭa. La ĉiam pli vasta bezono flanke de la popolo, rapidigis la disvolviĝon de la ferproduktado. Ĉiuj landoj ekspluatitaj ferminejojn. Kreiĝis pluraj ferproduktaj centroj. En grandaj ferforĝejoj laboris centoj da homoj. Iliaj riĉaj posedantoj samtempe entreprenis la elfosadon de minajoj, ekstraktadon de fero kaj disvendadon de ferajoj. Ilia riĉeco fariĝis komparebla kun tiu de la feŭdaj princoj.



Feraj instrumentoj

En tiu tempo la kamparanoj jam plugis teron per fera plugilo post la bovo kaj ankaŭ sarkis kaj rikoltis per feraj instrumentoj. La vasta uzado de ferajoj akcelis disvolviĝon de la agrikultura produktado. La kamparanoj ankaŭ eksciis prepari sterkon el putra herbo, kies uzado pli multe grandigis la kvanton de agrikultura produkto.

Dank' al uzado de feraj ŝpatoj en akvo-mastruma konstruado, vaste disvolviĝis la irigacio kaj surakva trafiko en diversaj lokoj. Qin-lando fosis la kanalon Zhengguo, kiu irigaciis 40,000,000 muojn da tero kaj faris el senfrukta tero kampojn fekundajn. La laboranta popolo de la oriento fosis grandan akvokondukejon, kiu interligis la Flavan Riveron kaj la riverojn Huai, Ru kaj Si, kaj tiel pli disvolviĝis la surakva trafiko.

**Apero de Prosperaj Urboj** La intersanĝo de diverslandaj produktajoj akcelis ekfloron de la komerco. La ĉefurboj de ĉiuj landoj, nome Linzi (Qi), Handan (Zhao), Loyang (Zhou), Xianyang (Qin) kaj Ying (Chu), fariĝis iom post iom grandaj urboj kies muro longas je miloj da ĝang-oj\*. En kaj ekster la urboj estis dense loĝataj. Manlaboristoj faris diversajn metiartojn belajn kaj delikatajn. En bazaro troviĝis produktajoj el diversaj lokoj: fiŝoj el la oriento, perloj el la sudo, eburo kaj rinoceraj feloj el la okcidento kaj rapidaj ĉevaloj el la nordo. La urbo Linzi de Qi-lando estis la plej prospera urbo, loĝata de 70,000 familioj. Ĝia silkteksaĵo estis eksportata al tre foraj lokoj. Oni diris: “La silkajoj el Qi-lando liveriĝas al ĉiuj sub la ĉielo”. La vojoj al Linzi estis plenaj de vojaĝantoj, ĉevaloj kaj veturiloj.



## B. La Unuigo de Ĉinio Fare de Qin-lando

Kiam multaj aliaj landoj jam pli kaj pli potenciĝis, Qin-lando estis ankoraŭ kompare post-restanta. La regpotenco estis en la manoj de la aristokratoj, al kiuj la kamparanoj devis ofere liveri siajn agrikulturajn produktaĵojn kaj plenumi servutajn servojn. La financaj rimedoj kaj milita forto de la ŝtato estis tre malgrandaj.

**La Reformado Sub tiaj kondiĉoj, la regnestro de Shang Yang** Xiaogong de Qin-lando enoficigis Shang Yang por efektiviĝi reformadon. La ĉefaj punktoj de la nova leĝo estis:

1. Abolici la terdividan sistemon de la vilaĝa komunumo, permesi liberajn aĉeton kaj vendon de tero, ĉiurimede akceli la agrikulturan produktadon kaj liberigi la servutajn servojn al tiuj familioj, kiuj diligentas en kulturado kaj teksado, kaj produktas abunde grenon kaj multe da silkajo.

2. Fortigi organizadon de la popolo. Ĉiuj 5 familioj formas unu kvinopon, du kvinopoj fariĝas unu dekopo. Se unu familio leĝon malobservas, ankaŭ la ceteraj naŭ familioj kunrespondas.

3. Titoli nobelajn rangojn ekskluzive laŭ militaj meritoj. La aristokratoj kiuj ne havis militan meriton, ne rajtas ricevi nobelan rangon, kiu siavice decidis la kvanton de posedeblaj kampoj de la familio.

4. Starigi administracian unuon de gubernio, kies administranton la ŝtato rekte enoficigas.

En la jaro 350 a.K. la nova leĝo estis publikigita antaŭ la palaca pordego. La aristokratoj

forte kontraŭstaris al la nova leĝo por defendi siajn pozicion kaj interesojn, sed Xiaogong punis kelkajn el la kontraŭantoj, subtenante la reformon de Shang Yang, kaj la nova leĝo fine enradikiĝis.

**La Prosperiĝo de Qin-lando** Post la reformado, rapide disvolviĝis la agrikulturo de Qin-lando. La ŝtato disponis grandan kvanton da grenoj. Kuraĝigite de la nova leĝo, la soldatoj fariĝis ĉiuj bravaj kaj lertaj. Tiamaniere pli kaj pli riĉiĝis kaj fortiĝis Qin-lando.

La potenciĝinta Qin-lando splitis la aliancon de la ses regnoj kaj klopodis ilin meti en intermilitadon. Samtempe ĝi amikigis la forajn landojn kaj atakis la najbarajn. Je la komenco de la 3-a jarcento a.K. Qin-lando venkis la aliancan armeon de la orientaj najbaroj Han kaj Wei, kaj rabakiris grandan terpecon. Tiuj du landoj fariĝis tre malfortaj. Iom poste Qin sukcesis rompi la aliancon inter Chu kaj Qi, venki la armeon de la antaŭa, kaj okupis la ĉefurbon Ying de la lasta, ke Chu-lando devis translokigi sian ĉefurbon orienten.

**Batalo ĉe Changpi** La potenco de Qin-lando sin etendis orienten laŭ la bordoj de la Flava Rivero. En la jaro 260 a.K. Qin-armeo okupis Shangdang de Han. Sub la minaco Zhao-lando koncentris grandan armeon de 450,000 soldatoj por gardi la urbon Changping ĉe la suda landlimo. Ĝia komandanto estis la fama generalo Lian Po. Ne povinte rapide gajni la batalon, Qin-lando kombinis intrigon de suspektigo, tiel ke Zhao-lando eksigis mem la generalon Lian Po.

---

## La Ĉina Mezur-sistemo

**P**RI la origino de ĉinaj mezuriloj rakontas multaj legendoj, inter kiuj la plej populara diras, ke la mezurunuon de longo oni formis antikve el kunvicigo de miliaj grajnoj. Kaj de tio devenis la mezurunuoj por volumeno kaj pezo. La normo de la mezuriloj ŝanĝiĝis de dinastio al dinastio, precipe dum la periodo de la 3-a ĝis 6-a jarcento. Ekzemple, en la jaroj 274-316 p.K. en Jin-dinastio unu futo longis 0.2304 metron, dum en Norda Qi (550-577) 0.2977 metron. Ĉar siatempe la registaro kolektis imposton en formo de greno kaj ŝtofo kaj la oficistoj ĉiam pli grandigis la mezurunuojn por eviti eventualajn deficitajn en mezurado, unuflanke, kaj por ebligi ankaŭ sin-profitigon, aliflanke. La situacio pliboniĝis kaj la normoj de mezuriloj fariĝis relative stabilaj nur

ekde la 7-a jarcento, kiam la impostoj komencis esti kolektataj kaj kalkulataj en mono.

Sed, ĉar tre vasta estas la teritorio de Ĉinio kaj la lando kuŝis de tre longa tempo sub la regado de lokaj feŭdalistoj, la mezuriloj uzataj en diversaj lokoj tra la tuta lando estis tre diferencaj. Ekzistis, ekzemple, pli ol 20 specoj de futo, inter kiuj la plej mallonga egalas 0.1998 metron, dum la plej longa 0.5798 metron. Kaj ofte en sama loko uziĝis pluraj longmezuriloj: la oficiala, la konstruada, la tajlora, la doganeja, kiu enkondukiĝis, kiam fremdaj potencoj ekprenis la mastrumadon de la ĉina doganejo, k.a. Simila ĥaoso regis ankaŭ ĉe aliaj mezuriloj.

La Kuomintang-a registaro siatempe faris klopodojn por unuecigi la mezurilojn, sed la efiko



**Grovurajo sur bronza spegulo pri batalaj scenoj de la epoko de la Militantaj Regnoj**



La nova generalo estis juna Zhao Gua, kiu ordonis facilaniman ofensivon, kaj la armeo estis sieĝita de la malamikoj. Post pli ol 40 tagoj, la tuta armeo estis kaptita kaj masakrita senkomplete de Qin-armeo.

La batalo ĉe Changping estis laŭskale la plej granda en tiu epoko kaj daŭris duonjaron. Post tio, la ĉefa militforto de Zhao el 450,000 soldatoj tute pereis, kaj la militforto de Qin-lando fariĝis ne plu venkebla.

tuŝis ĉefe la grandajn urbojn. Vera unuecigo de mezuriloj tra la tuta lando efektiviĝis nur post la liberiĝo de la lando, sub la kondiĉoj de plena unuecigo de la tutlanda ekonomio kaj politiko.

Ni donas ĉi sube la nun uzatajn mezurunuojn de la longo, areo, volumeno kaj pezo:

1. Mezurunuoj por longo:

Ĉe = triono de metro. Ĝiaj subdividoj nomiĝas cun (dekono), fen (centono). Ĝia dekoblo nomiĝas ĝang.

Li-o = duonkilometro.

2. Mezurunuoj por areo:

Mu-o = ses kaj du trionoj da aroj. Ĝia centoblo nomiĝas ĉing.

3. Mezurunuoj por volumeno:

Ŝeng = unu litro. Ĝia dekoblo nomiĝas doŭ.

4. Mezurunuoj por pezo:

Ĝin-o = duon-kilogramo. Ĝia centoblo nomiĝas dan. Deksesono de ĝin-o estas ljang (taelo), kiu egalas al 31.25 gramoj.

H. F.

## Aneksado de Qin al la Ses Landoj

En la jaro 246 a.K., Ying Zheng (la fama Qin Shihuang — la komenca Imperiestro de Qin-dinastio poste) fariĝis regnestro. Tiam la teritorio de Qin jam estis multe pli vasta ol tiuj de la ceteraj ses landoj kune, kaj Qin ilin englutis en dek jaroj ekde la 230-a jaro a.K. unu post la alia. Kaj en la jaro 221 a.K., Qin sukcesis plene unuigi la tutan Ĉinion.

\* 1 ĝang-o = 3 1/3 metroj.

(Daŭrigo de P. 172)

servi la cindrojn de eminentaj bonzoj. Sed tre malmultaj postrestas pagodoj mahometanaj k.a.

La materialoj por konstrui pagodojn en Ĉinio konsistis ĉefe el brikoj kaj ŝtonoj. Sed estas ankaŭ ligna, eĉ fera pagodo. Laŭforme oni povas dividi ilin en ses tipoj:

1. La multetaĝa. Ĝi entenas pli multe la ĉinan stilon de la alta multetaĝa konstruado, kun profundaj aleroj\* kaj altaj etaĝoj.

2. La densalerara. Laŭ la ekstera formo ĝia tera etaĝo estas tre alta kaj la supraj etaĝoj estas tre malaltaj, sen fenestroj kaj pordoj, kun malprofundaj aleroj, dense lokitaj unu super alia.

3. La soletaĝa. Ĝi en tuto ne estas tiel alta kiel la du jam nomitaj. Ĝi konsistas el unu etaĝo sufiĉe alta kun sola alero.

4. La lamaa. Oni trovas ĝin ofte ĉe lamaa templo. Laŭ formo ĝi pli proksimas al la hinda *stupa* kaj karakteriziĝas per dika trunko en formo de rondforma bloko, sur alta bazo. Sur la trunko troviĝas longa kolo, skulptita kun multaj rondaj ringoj, unu super alia, kiu finiĝas per pintajo kun emblemoj.

5. La *Vajrasana*. Ĝi havas altan kaj grandan bazon, sur kiu sidas pluraj pagodetoj. Ambaŭ la bazo kaj la pagodetoj estas bele skulptitaj. Tiu tipo enkondukiĝis en Ĉinion, pli malfrue, en la 15-a jarcento kaj ne estis multe disvastigita.

6. La flora. Ĝia karakterizado estas belaj skulptitaj figuroj sur la supra parto de la tera etaĝo. El tiu tipo postrestas al ni nur du en Hebej-provinco, el la epoko de la deka ĝis dektria jarcento.

La belaj pagodoj memorigas nin ĉiam pri riĉigo de nia kulturo per la fremda, kaj la fruktdona interrilatiĝo kun aliaj nacioj fare de niaj prauloj.


\* Tegmenta elstarajo ĉe la randoj.

# Ĉinaj Antikvaj Pagodoj

**J**AM antaŭ Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) ekzistis en Ĉinio ĉielskrapantaj multetaĝaj konstruaĵoj, la konstruado de pagodoj enkondukiĝis en la landon nur ekde la unua jarcento p.K. kune kun la budaismo. Postrestas al ni multaj antikvaj pagodoj kaj inter ili ne malmultaj estas eĉ el antaŭ mil jaroj. Pagodoj kutime staras en lokoj pitoreske belvidaj. Iuj estas suprenireblaj kaj de tie oni povas ĝui la belan panoramon de ĉirkaŭaĵoj. Ili fariĝas ne nur nedisigebla parto de la belaj pejzaĝoj kaj donas eĉ pli grandan belvidadon al la vizitantoj. Pro ilia graveco en la popola vivo kaj ĉina arkitekturo, antaŭ ne longe la Ĉina Poŝto emisiis specialan serion de poŝtmarkoj kun bildoj de famaj antikvaj pagodoj.

**Ŝtonpagodo de Xileng-sigelgravura Societo ĉe la Okcidenta Lago**


*Foto de Jiang Qi-sheng*



La hindoj nomas la Budaisman pagodon *stupa*. Laŭ la budaisma sutro, post la morto de Budao liaj adeptoj kremaciis lian kadavron, kaj el la cindro fariĝis solidaj perloj (nomataj sarira-oj): el

**Huqiu-pagodo en Suzhou, konstruita antaŭ mil jaroj**

*Foto de Xu Bi-hua*



la ostoj estiĝis blankaj; el la karno, ruĝaj; kaj el la haroj, nigraj perloj. Por konservi ilin oni konstruis *stupa-on*. La formo de tia pagodo estis simpla tombo en formo de duonglobo kun ne tre granda bazo sube kaj pinaklo supre.

En antikvaj libroj en Ĉinio oni nomis pagodon *futu* (tiam traduko de *stupa*). De post la disvastiĝo de budaismo en Ĉinio, oni trovis pagodon ofte tie, kie troviĝas budaismaj temploj. Krom por konservado de ostoj aŭ aliaj memorindaĵoj de Budao, tian konstruaĵon oni faris ankaŭ por kon-

*(Daŭrigo sur P. 171)*



# Kurso de Ĉina Lingvo

## Tria Leciono

1. Ni shì nǎ-yì guó rén? Wo shì yīngguórén.  
*Kiulanda ano vi estas? Mi estas anglo.*
2. Ni shì fǎguórén ma? Shìde, wo shì fǎguórén.  
*Ĉu vi estas franco? Jes, mi estas franco.*
3. Tā shì měiguórén ma? Búshì, tā búshì  
měiguórén.  
*Ĉu li estas usonano? Ne, li ne estas usonano.*
4. Ni shì āijírén búshì? Búshì, wo shì tuǎrqírén.  
*Ĉu vi estas egipto? Ne, mi estas turko.*
5. Tā shì búbúshì yìndùrén? Búshì, tā shì déguórén.  
*Ĉu li estas hindo? Ne, li estas germano.*
6. Zhe jī-wèi xiānshēng dōu shì nǎ-yì guó rén?  
Tāmen shì: hēlánrén, jiānárén, mòxīgērén,  
bōlánrén, pútaoyárén, rìběnrén, ruìdiǎnrén,  
ruìshìrén, sūliánrén, xībānyárén, xīlārén,  
xiōngyálìrén, yìndùrén, yuèánrén, zhìlìrén.  
*Kiulandaj anoj estas tiuj ĉi sinjoroj? Ili estas:  
holandano, kanadano, meksikano, polo, por-  
tugalo, japano, svedo, sviso, sovetiano, hispano,  
greko, hungaro, hindo, vietnamo, ĉiliano.*
7. Ni huì jiǎng zhōngguó-huà ma? Bú huì, wo  
huì jiǎng shìjièyǔ.  
*Ĉu vi povas paroli ĉine? Ne, mi povas paroli  
Esperante.*
7. Nide fángjiān li dōu you shénme? Wode  
fángjiān li you liǎng-zhāng zhūoz, zhūoz  
shàng you sān-běn shū. Zhè sì-zhī gāngbi  
shì wode péngyou de. Zhè yì-zhāng chuáng  
hé zhè wǔ-bā yiz shì tāmende.  
*Kio estas en via ĉambro entute? En mia ĉambro  
estas du tabloj, sur la tabloj estas tri libroj. Tiuj  
ĉi kvar plumoj apartenas al mia amiko. La  
lito kaj kvin seĝoj apartenas al ili.*  
*Wo you liù-běn shìjièyǔ shū, qī-zhī gāngbi,  
bābēn zhōngwēn-shū, jiǔ-zhāng zhuōz, shí-  
zhī hóng-qiānbì.*

*Mi havas ses Esperantajn librojn, sep plumojn,  
ok ĉinlingvajn librojn, naŭ tablojn, kaj dek  
ruĝajn kraĵonojn.*

10. Shuí shì Wáng xiānshēng? Shuí shì Lǐ  
xiānshēng? Zhè shì Wáng xiānshēng. Nà  
shì Lǐ xiānshēng.  
*Kiu estas sinjoro Wang? Kiu estas sinjoro Li?  
Ĉi tiu estas sinjoro Wang. Tiu estas sinjoro Li.*
11. Zhè shì shuǐde shū? Zhè shì tāde shū.  
*Kies libro estas ĉi tiu? Ĉi tiu estas lia libro.*
12. Zhè shì shénme? Zhè shénme yě búshì. Nǐ  
you shénme shū? Wo shénme shū dōu  
méiyǒu. Tā zuò shéme ne? Tā niàn-shū  
ne.  
*Kio estas ĉi tio? Ĉi tio estas nenio. Kian  
libron vi havas? Nenian libron mi havas.  
Kion li faras? Li legas libron.*

## GRAMATIKO

I. Demanda frazo. En la teksto ni jam rimarkis, ke estas tri formoj por fari demandajn frazojn: a) per almeto de demanda vorto *ma* ĉe la fino de indika frazo (2), kiel en Esperanto kun *ĉu* ĉe la komenco; b) per samtempa almeto de jesa kaj nea vortoj, *ĉu* kune (5), *ĉu* disigite (4); c) per almeto de vorto kun demanda senco lokigita en la sama loko, kiel tiu kun indika senco ordinare troviĝas, sed ne nepre ĉe la komenco kiel en Esperanto (1, 6, 8, 10, 11, 12).

II. Kalkula vorto. Oni metas kutime kalkulan vorton al numeralo por determini la substantivon. En la teksto (6, 8, 9) ni lernis jenajn kalkulajn vortojn:

*wèi* por homo (kun respekta senco);

*zhāng* por meblo k.s., kiuj havas ebenan malfermitan surfacon kaj por objekto, kiu havas formon de papero: larĝa sed maldika;

*běn* por libro aŭ kajero;

*zhī* por vergforma malgranda objekto;

*bǎ* por meblo aŭ objekto kun mantenilo.

III. Posesivo estas formata per almeto de *-de*, finaĵe al la pronomo aŭ substantivo, kiel ekz.:  
wode, tāmende (8), shuǐde, tāde (11).

*De* povas esti memstare uzata post substantivo por esprimi posedon aŭ apartenecon al ĝi, kiel ekz.:  
wode péngyou de (8).

IV. La finaĵo por adjektivo estas *-de* (oni povas ankaŭ alglui la determinan vorton senfinaĵe al la determinata) kiel ekz.:

*hóngde qiānbì* — *hóng-qiānbì* (ruĝa kraĵono).

La determinanton ĉiam antaŭiras la determinanton.

V. La vorto *you* signifas pli vaste ol *havi*, tiel ke oni kelkfoje devas ĝin traduki en Esperanton per *esti*, ekz.:

Wo you sǎn-běn shū. (Mi havas tri librojn.)

Zhuōz shàng you sǎn-běn shū. (Sur la tablo estas tri libroj.)

VI. Zhè signifas: *tio ĉi*, *tiu ĉi* (6, 8, 11); kaj *nà*: *tio*, *tiu*.

VII. En Han-lingvo, oni ofte uzas postpozicion kiu ludas rolon de prepozicio (8).


## VORTARO

āijírén	egipto	shìde	jes
bā	ok	Shìjièyǔ	Esperanto
bìlìshírén	belgo	fānguórén	franco
bōlánrén	polo	fángjiān	ĉambro
bù	ne	fēnlánrén	finno
búshì	ne, ne estas	gāngbǐ	plumo
chuáng	lito	guó	lando
de	-a	hélánrén	holandano
déguórén	germano	hóng	ruĝa
dōu	tute	hui	povi, scipovi
jiānádàrén	kanadano	jiǎng	paroli
jiū	naŭ	ji-	kelke da,
liǎng	en		kelka
lǐ	du	shuǐ	kiu

liù	ses	shuǐde	kies
ma?	(demanda	sì	kvar
	vorto)	sūliánrén	sovetano
měiguórén	usonano	tāde	lia
mòxīgērén	meksikano	tāmende	ilia
nà	tiu, tio	tūěrǐrén	turko
nǎ, nǎ-yì	kiu, kia	wode	mia
ne	(postmetata	wū	kvin
	vorteto por	xiānshēng	sinjoro
	emfazo)	xībānyáren	hispano
niàn-shū	libron legi	xīlārén	greko
nide	via	xiōngyálìrén	hungaro
péngyou	amiko	yě	ankaŭ
pútaoyárén	portugalo	yī	unu
qī	sep	yìndùrén	hindo
rén	homo, ano	yīngguórén	anglo
riběnrén	japano	yiz	seĝo
ruidiǎnrén	svedo	yuèánrén	vietnomo
ruìshìrén	sviso	zhè	ĉi tiu, ĉi tio
sān	tri	zhìlìrén	ĉiliano
shàng	sur, super	zhōngguó-	ĉina lingvo
shénme	kio, kia	hua	(buŝa)
shí	dek	zhōngwēn	ĉina lingvo
shì	esti, jes		(skriba)
shìbúshì	ĉu esti . . .	zuò	fari
	aŭ ne		

Tomu

# Ĉina Kuirarto



## Leonaj kapoj

(Ĉine: Shiz Tou)

Materialoj:

- 1 funto da dishakajo de grasa porkajo
- 3 sekigitaj agarikoj ŝvele trempitaj

- 2 coloj da printempa cepo
- 3 supkuleroj da sekigitaj salikokoj trempitaj
- 1 peceto da zingibro
- 2½ supkuleroj da ŝereo (aŭ blanka vino)
- 2 supkuleroj da sojsaŭco
- 1 tekulero da salo
- 1½ tekuleroj da sukero
- ½ funto da centraĵoj de ĉinaj brasikoj
- 4 supkuleroj da oleo
- 1 taso da kokida supo

Bone dishakadu grajne la agarikojn, cepon, salikokojn kaj zingibropecon. Miksu ilin kun la dishakita viando. Aldonu la blankan vinon, sojsaŭcon, salon kaj sukeron. Tranĉu la ĉinajn brasikojn en kvaronoj laŭlonge. Formu la spicitan viandon en kvar buloj. Varmigu la oleon ĝis ellaso de fumo. Aldonu la brasikajn tranĉaĵojn kaj ilin turnadu por ke ili kovriĝu per oleo. Metu la viandbulojn sur ilin kaj aldonu la supon. Boligu la tutajon, unue per forta kaj poste per milda fajro. Tiel post 15-minuta boletado la "leonaj kapoj" estas jam pretaj por frando de 4 personoj.

# Impresoj el Varna-kongreso

**V**ARNA estas ja belega urbo por ripozi, ĉe la marbordo de la Nigra Maro troviĝas multege da ripozdomoj kie ripozas ĉiusomere bulgaraj laboristoj. Varna kun ĝia komforta kaj alloga ripozejo bonvenigas nin gastojn el diversaj landoj. Hela vetero, sunbrilo, oraj sabloj ĉe la marbordo, freŝaj verdajoj kaj ĉiam ritme frapantaj ondoj — jen loko kie okazis dum julio la 33-a Bulgara Esperanto-Kongreso, kiun partoprenis pli ol 1500 delegitoj el diversaj urboj kaj vilaĝoj tra la tuta lando. Preskaŭ 70 gastoj venis el dek landoj, proksimaj kaj malproksimaj. Dank' al la entuziasmaj kaj penigaj klopodoj, la bone organizita aranĝo, kaj la gastama kaj afabla prizorgo de LKK kaj CK de Bulgara Esperantista Asocio, ni gastoj ĝuis tre ĝojigajn tagojn en tiu ĉi somera ripozejo.

La Kongreso estas sukcesoplena. Neniu povas dubi ke la bulgaraj esperantistoj meritas laŭdon por ilia oferema laboro. Landa kongreso kun tiom da partoprenantoj ege surprizis nin. Laŭ statistiko de la kongreso, preskaŭ duono aŭ triono el la partoprenantoj estas oficialaj delegitoj de lokaj Esperanto-organizadoj. Tiu fakto enskribis novan paĝon en la historion de landa Esperanto-movado. Mi trovis ke la bulgara popolo tre atente observis la progresadon de la Kongreso. Ekzemple, super preskaŭ ĉiuj stratoj de la urbo estis pendigitaj sloganoj "Per Esperanto por Monda Paco" ktp. en Esperanto kaj ankaŭ en la bulgara lingvo. Ĉie en la urbo, ĉu en montro-fenestroj aŭ en restoracioj oni povas vidi belan afiŝon de la Kongreso, kaj oni ankaŭ povas ĉie trovi diversspecajn reklamojn (almenaŭ dek specoj) por propagandi Esperanton. La 20-an de julio, en kiu tago malfermiĝis la Kongreso, la urba tagjurnalo "Popola Afero" dediĉis eĉ tutan paĝon por klarigi al siaj legantoj la utiligon de Esperanto. La plej granda gazeto en Sofia "Laborista Afero" publikigis artikolojn de sia speciala korespondanto pri ĉiutaga progreso de la Kongreso. La Kongreso estas sukcesoplena ankaŭ pro tio ke ĝi prezentas al la Esperanta publiko teatraĵojn en Esperanto. Ĉiujn rolojn ludis profesiaj artistoj kaj artistinoj kiuj lernis Esperanton nur antaŭ unu aŭ du monatoj. La prezentado estis tiel sukcesa ke la vizitantoj aplaŭdis freneze. La artistoj kaj artistinoj tiel lerte ludis kaj samtempe tiel bele elparolis Esperanton kvazaŭ ĝi estus ilia gepatra lingvo. Per tio la Kongreso elokvente montras al la publiko ke Esperanto estas vivanta lingvo,

ĉiam kreskanta kun potenca esprimpovo kaj vivforto.

Oni povas aserti ke la Esperanto-movado en Bulgario estas tre prospera. Ĉie oni povas trovi kaj renkonti esperantiston en la ĉarma lando. La estro de la restoracio kie ni ĉiutage matenmanĝis estas esperantisto, li salutis nin kaj kompreneble regaligis nin per treege bongustaj bulgaraj manĝaĵoj. Kiam ni vizitis la Uzinon je la nomo de Karl Marks nin akceptis la vic-direktoro, kiu parolis kun ni en Esperanto kaj regaligis nin per tagmanĝo; en la uzino troviĝas Esperanto-grupo konsistanta el 14 homoj, inter kiuj estas maljuna laboristo kiu akompanis nin dum la tuta ekskurso. La rektoro de la urba instituto de ekonomiko ankaŭ estas esperantisto, kiu faris paroladon en la solena malfermo de la Kongreso. Mi estis tute surprizita kiam K-do Teolov, centra komitatano de Bulgara Kompartio alparolis al mi en Esperanto. Kiam mi forlasis Bulgariion mi ankoraŭfoje renkontis esperantiston en la aviadilo tute hazarde. Iu profesoro de geofiziko vidante mian verdan stelon alproksimiĝis al mi kaj salutis min en Esperanto. Kiam li eksciis ke mi alvenis al Bulgario speciale por partopreni la Kongreson, li verŝajne estis tre ĝoja. Li diris ke li antaŭe estis sincera leganto de nia gazeto "El Popola Ĉinio", sed li ne scias ĝian reaperon. Ni fariĝis tuj intimaj amikoj kaj dum la tuta tago interparolis pri diversaj temoj Esperante.

En Varna kaj en Sofia kompreneble allogas nin multaj vidindaĵoj. La arbaro de ŝtonoj, la malnovaj preĝejoj, la muzeoj kaj la monto Vitoŝa de kie oni povas vidi la noktan scenon de Sofia. Tamen plej alloga por ni estas la bulgara popolo. Vivi inter tia popolo, tiel gastama, tiel pac-ama kaj tiel fervora, oni tuj sentis sin hejme kaj feliĉe. Mi ĉiam memoras la knabinecon sur strato kiu naive, sed entuziasme salutis min en Esperanto. Mi partoprenis kune kun gastoj el socialismaj landoj la demonstracian mitingon de Varna loĝantaro por defendi pacon. Preskaŭ duono de la tuta loĝantaro manifestaciis tiun tagon kontraŭ la invado de Usonaj kaj anglaj imperialistoj al Libano kaj Jordano. Dum la mitingo ili montras sian fortan deziron por akiri kaj defendi pacon. Ni estis emociitaj kaj sekvas ilian vicon demonstracii tra stratoj. Mi renkontis en Centra Universala Magazeno (Sofia) vendistaron. Kiam ŝi eksciis ke mi venis



el malproksima popola Ĉinio por partopreni la Kongreson kaj por gratuli al la bulgara popolo, ŝi tuj forte premis miajn ambaŭ manojn, kaj multe parolis, kvankam mi ne povis kompreni la tuton tamen tra ŝia mieno kaj esprimoj mi tuj komprenis ĉion, ĉar ŝia mieno ja parolis pri paco, amikeco kaj solidareco inter popoloj.

Nur ses tagojn en Varna ni vivis kaj laboris kaj ĝuis kune kun niaj karaj bulgaraj fratoj kaj

sameanoj el diversaj landoj, sed la impresoj estas tiel fortaj ke mi dum la tuta vivo ne povos forgesi pri la ĉarma lando kaj la ĉarma bulgara popolo kiu ĉiam kun ridetoj sur vizaĝoj, kiuj bone scias kiel ripozi kaj ankaŭ bone scias kiel forte laboregi por konstrui socialismon, kiuj nomas nian lingvon "lingvo de paco kaj de amikeco".

Pekino. 12, aŭg. '58

## Amika Voĉo el Novzelando

Tre Karaj Samideanoj,

Pardonon mi petas, ĉar ĝis nun mi ne skribis por esprimi mian dankon pro la feliĉaj tagoj vi kaj ankaŭ mia nova amikino ebligis por mi dum mia vizito al via urbejo. Elkore mi estas dankema kaj memoro de tiuj ĝojoplenaj tagoj restos kun mi tra la daŭro de la jaroj. Pri la vizito mi ankoraŭ senĉese parolas kaj certe parolos. Al ĉiu amik(in)o renkontita mi priskribas la viziton al la Granda Muro, la Tomboj kaj la Palaco. Sed precipe pri la vizito al la Granda Muro mi parolas, ĉar tio laŭ mi estas la plej mirinda spektaklo. Mi konsideras la Muro kaj la Granda Kanjono en Usono esti la plej elstaraj vidindaĵoj kiujn mi iam vidis. La unua estas manfarita, la dua el la naturo. Estas mia revo ke la sorto ankoraŭ iam favoros min kaj ke mi havos la bonŝancon reveni post kelkaj jaroj por revidi miajn karajn geamikojn en Pekino kaj ekvidi denove tiun muron.

En Pekino kaj en Ŝanhajo mi trovis multe pli da samideanoj ol mi atendis. Estas

granda ĝojo scii ke nia kara paca lingvo prosperas en fora Ĉinujo. Kiu alia persono krom esperantisto povus ĝui la veran gefratecon kiel ni dum tiu vizito? Ni laboru por la tago kiam nia lingvo kaj sekva paco regos en la mondo.

Antaŭ multaj jaroj la esploristo Marko Polo, traveturis la malproksiman orienton. Kio instigis lin fari tiun vojaĝon estas al mi nesciita. Eble li aŭdis pri la fabelaj trezoroj de tiuj ankoraŭ ne multe konataj landoj kaj volis riĉiĝi. Sed kio ajn liaj motivoj, mi faris la vojaĝon por trovi la riĉecon de amikeco kaj pri la eltrovo mi estas absolute kontenta.

Okulfrape estas la laboremo de la popolo de Ĉinujo, certe venos la tago kiam ili ĝuos bonajn kondiĉojn. Ni esperu ke tiam la okcidentaj landoj estos pli malsovaĝaj kaj ke paco regos en la mondo. Kun dankoj kaj bondeziroj mi restas

Via sincere  
Patricia De Cleene

## Letero de Nia Hungara Amiko

Karaj gekamaradoj!

Nun kiam mi trian fojon alvenis vian landon Ĉinion mi ne povas lasi tion sen vorto. La unuan fojon mi venis en la jaro 1951, kiam ni hungaroj liveris al Ĉinio diversajn agrikulturajn maŝinojn kaj mi venis por helpi trejnadon de manipulantoj de la maŝinoj. Ĉion mi faris kun entuziasmo, ĉar mia fabriko estraro tion konfidis al mi. Des pli granda estis mia entuziasmo kiam mi havis esperantistan interpretiston k-do Jang Jungsen. Kaj tiel mi laboris 8 monatojn en Ĉinio.

La duan fojon mi venis en oktobro de 1952. Kaj nun post kvinjara foresto mi denove havas la feliĉon ankoraŭfoje viziti Ĉinion. Min ĝojigas ankaŭ tio, ke mi konatiĝis kun nova esperantista amiko k-do Li De-ŝju, kiu interpretis por mi en la instruado.

Karaj gek-doĵ! mi tre ĝojas ke mi lernis la internacian lingvon Esperanto en jaro 1920. Ĝi jam bone min servis en multaj landoj. Tial mi rekomendas al ĉiuj lerni la lingvon Esperanto.

*Mi tre dankas al la Pekina Esperanto-Klubo ke ĝi aranĝis tiel ke mi denove havis k-don Li De-ŝju, kiu tre bone parolis kaj interpretis ĉie en mia afero. Mi neniam forgesos tion.*

*Mi ĝoje kaj entuziasme laboras en Ĉinio, ĝuste kiel en mia patrujo. Tre afablaj estas la ĉinaj gekdoj, pro tio mi sentas grandan feliĉon.*

*Nun mi jam travojaĝis kvin provincojn Ŝantung, Kansu, Honan, Hopej kaj la Nordoriento. Mi rimarkis ke la vivnivelo bele altiĝis kaj la varprezoj pli malaltiĝas ol antaŭ 5 jaroj kiam mi estis en Ĉinio lastfoje. Ankaŭ mi devas konstati ke la landskala konstruado en Ĉinio treege progresis. La trafiko per aŭtobusoj kaj tramoj multe pli bona nun en la ĉefurbo Pekino ol antaŭ 5 jaroj.*

*Nun mi vokas:*

*Vivu la nedisigebla amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Hungario!*

*Vivu la popolo de Ĉinio!*

*Vivu la solidareco de la tendaro socialisma estrata de Sovetunio!*

*Vivu la mondpaco per Esperanto!*

*Salutas vin elkore  
via  
J. Kiraly*

**K-do J. Kiraly instruas al ĉinaj traktoristoj pri hungara traktoro.**



. KURANTAJ \* AFEROJ . KURANTAJ \* AFEROJ . KURANTAJ \* AFEROJ . KURANTAJ \* AFEROJ . KURANTAJ \* AFE

## **HIDROMETALURGIA FABRIKO PLANITA**

Finpretiĝis antaŭ nelonge la unua projekto por produktado de kupro per hidrometalurgia procedo sub altaj aeropremo kaj varmo. Oni jam decidis konstrui la fabrikon laŭ tiu projekto en unu jaro. Laŭtakse ĝi povos plialtigi la produkton de kupro je 35% ol la fanda metodo el sama minajo.

## **ALTAJ LERNEJOJ TRA LA TUTA LANDO**

En la alta tajdo de teknika revolucio multaj subprovincaj distriktoj kaj gubernioj komencis aktive la establado de altaj lernejoj. Nur en la unua duono de la kuranta jaro fondiĝis en Heilongjiang-provinco 16 altaj lernejoj; en Zhejiang-provinco 29; en Henanprovinco 87; en ceteraj provincoj kiel Fujian,

Gansu, Jiangsu, Sichuan, Shanxi, Jilin k. a. ankaŭ establiĝis en mallonga tempo multaj altaj lernejoj bezonataj de la respektivaj lokoj. Inter ili troviĝas universitatoj, kolegioj, ĉu multafakultataj ĉu sol-fakultataj. Iliaj komunaj karakteroj konsistas en tio, ke ili estas establita de la lokaj instancoj (kelkaj de fakaj organizoj); la kursoj respondas al la lokaj konstruadaj bezonoj; la instruado intime ligiĝas kun la praktiko kaj la studentoj ne forlasas la produktajn laborojn.

## **LA UNUA NUKLEONA REAKCILO**

En la Atomenergia Instituto de Ĉina Scienca Akademio nun ekfunkcias la unua eksperimenta nukleona reakciilo. Samtempe instaligiĝis ankaŭ ciklotrono. La projekto de la

nukleona reakciilo estas farita laŭ la plej progressa tipo. Ĝi apartenas al tipo pezakva kaj havas termikan povon de 7,000 ĝis 10,000 kilovatoj. Krome instaligiĝis de la ĉinaj teknikistoj ankaŭ altprema Van de Graaf-generatoro, kiu povas akceli la rapidecon de protono ĝis la povo de 25 elektronvoltoj.

## **AŬTONOMIO DE NACIMINORITATOJ**

Ĝis junio de kuranta jaro jam fondiĝis en Ĉinio por naciminoritatoj 3 aŭtonomiaj regionoj (samrangaj al provinco), 31 aŭtonomiaj subprovincaj distriktoj kaj 55 aŭtonomiaj gubernioj. Krome estas preparataj 2 aŭtonomiaj regionoj: la Hui-a en Ningxia-provinco kaj la tibeta en Tibeto. Entute pli ol 58,000,000 popolanoj el 35 naciminoritatoj ĝuas aŭtonomion.

## NI SUPERIS USONON EN PRODUKTO DE TRITIKO

Laŭ statistiko publikigita en lasta julio de la Agrikultura Ministrejo de Ĉinio, ĉijare en Ĉinio okazis senprecedenca abunda somera rikolto. Sole la rikolto de tritiko atingis 39,950-000 tunojn. Tiu ĉi sumo jam superis tritiko-produkton de Usono je pli ol 3,000,000 tunoj, ĉar laŭ takso publikigita je 10-a de julio, de la Usona Agrikultura Ministrejo la tuta tritiko-produkto en Usono estos 1,343,-490,000 buŝeloj, t. e. 36,569,000 tunoj.

Notinde estas, ke la abunda rikolto ne venis de favoraj naturaj kondiĉoj, sed kontraŭe de la homaj klopodoj spite al la malfavoraj kondiĉoj de sekeco, frostoj, atakoj de malutilaj insektoj kaj aliaj katastrofoj. La legantoj ankaŭ rimarku, ke la nova rekordo de tritiko-produkto po-mua estas 3,660 kg., do jam

multe superis laantaŭan, raportitan en la lasta numero de nia gazeto.

## BAOTOU-LANZHOU-FERVOJO FINKONSTRUITA

La milkilometra fervojo de Baotou, la nova bazo de ŝtala industrio en Norda Ĉinio, ĝis Lanzhou, la ĉefurbo de Gansu-provinco, finkonstruiĝis je la 31-a de julio, 5 monatojn antaŭ la fiksita dato. Tiu ĉi la antaŭe fiksita dato. Tiu ĉi fervojo trakuras la Aŭtonoman Regionon de Interna Mongolio, Ningxia- kaj Gansu-provincoj konkerante la dezertojn kaj montaron, kaj dufoje transiras la Flavan Riveron. Malfacila estas la konstrua laboro. Tamen la bravaj konstruintoj ĝin finis en malpli ol 4 jaroj. Nun Lanzhou fariĝis la centro de 4 grandaj fervojoj: Baotou-Lanzhou-a, Lianyungang-Lanzhou-a, Lanzhou-Xinjiang-a, kaj

la konstruata Lanzhou-Qinghai-a.

## ĈU EBLAS LIKVIDO DE SCHISTOSOMIASIS?

Laŭ aserto de medicinistoj en multaj landoj ne estas likvidebla la malsano *Schistosomiasis*, t. n. katajama-malsano en Japanio, kiun kaŭzas la parazita vermo *distomum haematobium*. Sed en la kvinjara kampanjo kontraŭ tiu ĉi malsano en Ĉinio renversis tiun ĉi aserton. Laŭ statistiko ĝis la fino de majo en la kuranta jaro jam pli ol 915,000 malsanuloj de tiu malsano en 12 provincoj kaj grandaj urboj resaniĝis, kaj en pli ol 60 gubernioj kaj urboj plene ekstermiĝis la gastigantoj (scala aurita sow) de la aĉaj vermoj. Du gubernioj en Jiangxi-provinco jam plene likvidis tiun ĉi malsanon kaj en 8 gubernioj kaj urboj ĝi jam fundamente malaperis.

# Korespondi Deziras

\***S-ano Lu Jian-bo**, prof. de monda historio, 54-jaraĝa dez. kor. kun italaj s-anoj por interŝanĝi librojn esp-ajn aŭ italajn pri Dante kaj renesanco. Adr.: Sichuan-Universitato, Chengdu, Sichuan-provinco Ĉinio.

\***Palaco de Pioniroj en Arĥangelsk USSR** atendas revokojn de pioniroj kaj lernantoj de mezlernejoj el Ĉinio kaj aliaj landoj. Adr.: Esperanto, Dvorec Pionerov Arĥangelsk-USSR.

\***N. Sevcugov** (adr.: USSR, Krasnojarsk, Ulica Kirova, 11, kv. 29), gitaristo, dez. kor. kun

ĉinaj s-anoj, precipe instruistoj, lingvistoj, radioamatoroj, muzikistoj.

\*Dez. kor. kun ĉinaj geesperantistoj interŝanĝi librojn, pm. pk, muzikajojn, insignojn, fotojn. . . Adreso: **Le-Kien-duc**, 190, strato Ba' Tuên, Hanoi, Vietnamio.

\***Ozimko Leonardo V.**, 19-jara, volas korespondi pri interŝanĝo de poŝtkartoj, poŝtmarkoj, kreskigo de floroj kaj legomoj kaj pri aliaj temoj. Adreso: USSR, BSSR 9, urbo Laĥoviĉy, Brestska, Polevoj, d. 1.



\***Teknikisto-teknologisto Ivan Savkin**, Gorkij-43, pr. Kirova, ĉ-1, USSR. dez. kor. kun E-istoj alilandaj pri literaturo, tekniko kaj popola vivo kaj diversaj temoj.

\* **S-ro Bánáti István** kaj 31 gesamideanoj dez. kor. kun esp-istoj en ĉiuj landoj pri diversaj temoj. Adr.: S-ro Bánáti István, BEKESCS-ABA, I. Bánáti u. 26. Hungarujo.

\* **18 gejunuloj de Bulgario** dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj. Skribu al: Bogdan Cvetkov, v. Pordim, r. Plevensko, Bulgario.

\* **S-ro Jaromír Pavlacký**, dez. kor. kun botanikistoj en orientaj landoj por interŝanĝi semojn de teorbusto. Adr.: Veseli nad Moravou, Ĉeĥoslovakio.





## ĈINAJ ANTIKVAJ PAGODOJ

1. Qianxun-pagodo (la meza) en Dali, Yunnan-provinco, konstruita antaŭ mil jaroj, altas pli ol 100 metrojn.
2. Baoshu-pagodo en Hangzhou, Zhejiang-provinco.
3. Lamaa pagodo en Beihai-parko, Pekino.
4. Liuhe-pagodo en Hangzhou, Zhejiang-provinco.
5. La Malgranda Ostardo-pagodo en Xi'an, konstruita en 652 p.K. kaj parte detruita de tertremo en 1555 p. K.
6. Brika Pagodo ĉe montpiedo de Songshan-monto, Henan-provinco, konstruita antaŭ pli ol 1400 jaroj.

(Legu la samtitolan artikolon en ĉi n-ro)

